

ESPERANTO



LA ADMINISTRATIVA OFICEJO DE U.E.A.

N-ro 602 (1)



Januaro 1956

REVUO INTERNACIA

Revuo Internacia

N-ro 602 (1)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por-la redakcio oni sendu al la

Redaktoro: W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefono: Rotterdam 128313.

* * *

Bankisto de U.E.A.: R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C. Ĝirkonto de nia bankisto: 6400.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron al nia redakcio.

Jara abono (1956): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

| | | | |
|----------|-----------|----------|----------|
| 1 paĝo | 128.— gld | 1/2 paĝo | 64.— gld |
| 1/4 paĝo | 32.— gld | 1/8 paĝo | 16.— gld |
| | 1/16 paĝo | 8.— gld | |

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 8000.

ENHAVO

| | |
|---|----|
| Nova epoko. <i>E. Malmgren</i> | 1 |
| De la Administra Oficejo. | 2 |
| La Tigro. Blake (<i>Auld</i>). | 3 |
| Oficeja Kroniko. | 4 |
| Ĉe l'akvo de forgeso. <i>M. Boulton</i> | 8 |
| Libro, kiu vekis kaj ridigis la mondon. <i>O. Ginz</i> | 11 |
| Vagado sub palmoj (6). <i>J. Ribillard</i> | 12 |
| Rubrikoj | |
| Tra la mondo esperantista. | 1 |
| Esperantista vivo. | 3 |
| Nekrologo. | 3 |
| 41a U.K. de Esperanto. | 5 |
| Internacia konkurso. | 5 |
| Novaj Libroj. | 6 |
| Oficiala Informilo. | 14 |
| Radio. | 16 |

La kovrilon desegnis s-ro John Hartley (Maŝestro)

Nova epoko

Novjarsaluto de la Prezidanto de U.E.A.

Kun granda optimismo ni povas renkonti la novan jaron. Kaj tiu optimismo estas bazita ne nur je profunda fido al la kvalitoj kaj la interna forto de nia lingvo, sed ankaŭ je la novaj perspektivoj por nia agado kaŭze de jam akiritaj sukcesoj kaj samtempe novaj teknikaj rimedoj je nia dispono.

UEA kiel konsulta asocio de Unesko konstante kaj daŭre kunlaboras kun tiu kulturorganizaĵo pri pluraj aferoj. Estas antaŭvidite ke tiu kunlaboro iom post iom pliintensiĝos por la bono ne nur de nia lingvo sed antaŭ ĉio por la ĝenerala aktiviĝo de la altaj humanecaj agadoj troviĝantaj en la programo de Unesko.

Eŭropa Konsilantaro en tiu ĉi jaro faros decidon kaŭze de propono, ke esperanto estu prove instruata en minimume unu lernejo de Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando, sub aŭspicio de Eŭropa Konsilantaro, kun posta oficiala kontrolo de la rezultoj. Tiun proponon faris en la lasta aŭtuno 14 delegitoj de tiu organizaĵo reprezentantaj 5 ŝtatojn.

Ĝojiga informo el Jugoslavio komunikas, ke la Konsilantaro por Klerigo kaj Kulturo en Slovenujo decidis akcepti esperanton kiel fakultativan fakon en ĉiuj lernejoj de tiu lando. Jam antaŭ multaj jaroj simila leĝo validas por Aŭstrujo. Kaj laŭ la sugesto de UEA dum 1955 estos prezentata al la registaroj resp. parlamentoj en deko da aliaj landoj propono, ke esperanto estu permesata kiel nedeviga fako en la lernejoj sub oficiala kontrolo kaj protekto.

UEA havos la ŝancon en la jaro 1955 liveri, pli ol antaŭe, ampleksan subtenon kaj teknikan helpon je la disvastigo kaj informado de la internacia lingvo.

La revuo ESPERANTO ricevis novan kaj pli plaĉan aspekton por konformi al la nunaj bezonoj kaj por pli taŭge prezenti nian aferon al la ĝenerala publiko.

La nova oficejo de UEA, ĵus instalita kun modernaj belaspektaj mebloj en la centro de Rotterdama, fariĝos la „vizaĝo“ de la asocio kaj estas preta dece akcepti ne nur la esperantistojn sed ankaŭ kiujn ajn reprezentantojn de kunlaborantaj institucioj.

La Centro de Esploro kaj Dokumentado, ankaŭ novinstalita en bela domo, post kelkjara funkciado nun estas plene laborkapabla kaj disponas pri riĉa dokumentaro, utiligota por venonta agado. 81 sciencistoj — kunlaborantoj en 20 landoj garantias konstantan evoluon de la servo de CED.

UEA disponas pri la grandioza materialo de la ekspozicio, kolektita por la Montevidea evento, por mondskala utiligo. Ĉar la ekspozicia materialo estas tre ampleksa, la transportkostoj al aliaj lokoj estas konsiderinde altaj, sed UEA nun studas la manieron venki tiun malfacilajn.

UEA jam eldonis la libron „La internacia lingvo“, kiu donas plej kompetentan enkondukon kaj prezentadon de nia lingvo. La valoro de tiu libro fariĝas pli kaj pli evidenta. Kaj en la lasta monato UEA eldonis gramofondiskon, kiu certe montriĝos bonega ilo en la manoj de la esperantistoj. Temas pri disko, enhavanta salutparolojn de reprezentantoj de 23 nacioj en la kongreso de Bologna, pruvanta nekontesteble la vivantecon de la lingvo kaj la unuecan parolmanieron, pri kio niaj kontraŭuloj ankoraŭ dubas.

Jen mia novjara saluto al la membroj de UEA. Vi vidas, ke tiu mia saluto ricevis formon de konciza nombrado de faktoroj, esperplenaj kaj gravaj por la progreso de nia afero. Mi elektis tiun manieron por draste kaj frape esprimi miajn korajn bondezirojn por la nova jaro kaj same varman esperon pri solidara, harmonia kunagado por atingi niajn celojn.

Ernfrid Malmgren.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Aŭstralio

Ĵus finiĝis en Melburno la 5a Granda Model-Ekspozicio, kune kun Internacia Komerca Foiro. La Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Melburna Esperanto Klubo havis belan standon ĉe la ekspozicio. Granda afiŝo: „Esperanto la Model-lingvo“ altiris milojn da vizitantoj, kaj estis ekspoziciitaj multaj libroj, gazetoj kaj turismaj broŝuroj. Oni vendis multajn lernolibrojn kaj vortarojn. Aro da Melburnaj Esperantistoj deĵoris dum la tuta semajno, kaj nova kurso estis rezulto de tiu ĉi propagando. En la oficiala programo de la ekspozicio aperis bona 2-paĝa artikolo pri Esperanto kun granda bildo de d-ro Zamenhof. Ĉar la eldonkvanto estis 15,000, oni povas prezenti al si la grandan propagandvaloron.

Aŭstrujo



De maldekstre: popolstudia estro *Rudolph Leichter*, aŭstria parlamentano *Hanz Gzettel* kaj grupsekretario *Kuttelwarcher*.

Interesa Esperanto-ekspozicio okazis de la 11a ĝis la 14a de novembro 1955, en la kadro de la „Popolstudio” en Ternitz, Malsupra Aŭstrujo. La ekspozicio estis aranĝita de la Esp-grupo „im Schwartzatal”, kaj la riĉa materialo estis pruntita de la Esp-grupo Wr. Neustadt. La esperanta landestro Joh. Schwarz inaŭguris la ekspozicion, kaj la aŭstra ĉefdelegito de U.E.A. parolis pri „La belo kaj utilo de Esperanto”.

Danujo

En eksterordinara ĝeneralkunveno la 23an de oktobro, Studenta Esperanto-Klubo en Kopenhago decidis vigligi sian agadon, sub prezidanteco de Povl Skarup. La klubo aliĝos al Centra Dana Esperantista Ligo, kaj organizos fakkunvenon de studentoj dum la 41a U.K.

Francujo

Pro la iniciativo de s-ro Andreo Ribot, Ĝenerala Sekretario de U.E.F., la gelnantoj de la Kolegio kaj de la Perfektigaj Kursoj en La Réole (Gironde) estis invititaj ĉeesti paroladon de s-ro René Llech-Walter, Estrarano de U.E.A. kaj Vicprezidanto de UEF. Tiu prelego bonege sukcesis. Oni devas atribui la sukceson: 1e, al la titolo de la parolado, kiu ne entenis la vorton „esperanto”; ĝi estis: „De la Nebuloj de Nederlando ĝis la suno de Roussillon”; 2e, al la anonco de diverskoloraj bildoj pri Nederlando kaj Roussillon, kiuj estis, sendube, alloga argumento favore al la koncerna parolado. Sed, malgraŭ tio, Esperanto ne estis forlasata. Efektive, la prelegisto lerte parolis pri la miraklo de la interkompreniĝo en Haarlem, kaj projekciis allogajn lumbildojn, kiuj montris la multnombrajn gekongresanojn en la koncerna urbo. Vidante, ke la publiko tre interesiĝas pri tiaj seninterpretistaj kongresoj, la paroladisto proponis sur la nigra tabulo, pruvan klarigan lecionon pri Esperanto. Estis ja granda sukceso. Efektive, la junaj kolegiانو partoprenis kun

entuziasmo tiun kurseton, formante vortojn kaj eĉ frazojn esperantlingve, jam laŭ la gramatikaj reguloj.

★

En „Journal de Médecine de Lyon” de la 5a de novembro 1955 aperis artikolo de P. Bertrand, M. Girard, Aupecle, J. Dalmais kaj J-P. Giullaud, „Divertikla sigmoidito kaj kancero kunestantaj”, kun resumo en Esperanto.

Jugoslavio

La Esp-societo „Marko Nešić” en Novi Sad, en kunlaboro kun Vojvodia Esperanto-Ligo, organizis la 22an de oktobro modestan feston en Laborista Domo okaze de la 10-jara jubileo de Unuiĝintaj Nacioj.

Pri la signifo kaj laboro de UNO parolis esperantlingve Zivan Milisavac, verkisto-prezidanto de VEL. Pri rezolucio de UNESKO favore al Esp. parolis serblingve Dušan Jeneckov, prezidanto de Esperanto societo N. Sad. Sekvis programo de poemoj originalaj kaj tradukitaj.

Monako

Post unujara kampanjo pores-

peranta per artikoloj en la regionaj gazetoj, kaj dusemajna ekspozicio, freŝe renaskiĝis Esperantista Grupo en la princlando Monako. En majo 1955, okaze de la Kongreso de la Provenca Federacio, la provizora komitato de la Grupo jam oficiale akceptis la kongresanojn en la Jakt-Klubo de Monte Karlo, kaj ĉiuj ĝoje salutis la revigliĝon de nia movado en tiu paradizeto.

Estas necese scii, ke la unua Grupo de Monako estis kreita en 1902, sub la instigo kaj la alta protekto de Lia Princa Moŝto Alberto la, eminenta maristo kaj sciencisto, kies verkoj estis esperante tradukitaj kaj presitaj en la Princlando mem. La unua mondmilito velkigis kaj mortigis tiun organizon. Antaŭ proksimume 20 jaroj, d-ro De Kolovrat kaj s-ro Georges Avril denove starigis grupon, kiu sukcesis ĝis la dua mondmilito.

Fine, ĉi tiun jaron kelkaj samideanoj sindone klopodis kaj decidis reŝtigi la torĉon. Nun propagando per afiŝoj kaj artikoloj okazas, kaj baldaŭ elementa kurso kolektos novulojn, kaj oni esperas, ke la movado ĝuos longan kaj feliĉan vivon. La honora Prezi-

DE LA ADMINISTRA OFICEJO

La unuaj tagoj en Rotterdam portis al ni surprizon post surprizo. Komencis per vizito, meze en la transporta haoso, de nia plej nova honora membro, Prof. Fernandez Menendez el Montevideo! Poste, kvankam la domo ankoraŭ ne estis preta kaj neniu pensis pri iu oficialaĵo, alvenis amaso da gratuloj, bonvenigoj, telegramoj kaj eĉ floroj kaj kelkaj donacoj por plibeligi la novan hejmon de nia Asocio. Ĉar estas neeble, danki al ĉiuj persone, ni ĉi tie publike esprimas nian koran dankon al ĉiuj, kiuj montris tian kuraĝigan simpatian en tiuj tagoj.

La oficejo funkcias, sed tio ne signifas, ke ni estas ĉe la tago kun la laboroj. Kontraŭe, la laboroj amasiĝintaj dum la periodo de nefunkciado, nur malrapide malpliigas pro ĉiutaga alvenado de novaj laborprovizoj. Tial ni petas indulgon de ĉiuj, kiuj devas longe atendi respondon aŭ plenumon de petoj kaj mendoj. Ni antaŭvidas, ke plej laste la 1-an de februaro 1956 ni estos ĉe la tago kun ĉio. Post tiu dato ĉiu rajtas superŝuti nin per riproĉoj, se ni ne akurate plenumos ĉiujn taskojn. Tio, cetere, estas la dato antaŭvidita en Bologna por la definitiva transpreno.

Pri la finaranĝo kaj plibeligo de la domo mem sindone laboradas kelkaj roterdamaj samideanoj. Laŭ la planoj ili estos finintaj sian libervolan taskon en la fino de decembro kaj tiam ni aranĝos oficialan inaŭguron en ĉeesto de lokaj aŭtoritatuloj kaj de kelkaj estraranoj de U.E.A. Do, kiam vi legos ĉi tiujn liniojn, ĝi estos jam okazinta.

Marianne H. Vermaas, Administranto

danto estas d-ro Boisson, advokato kaj urba konsilanto, kiu scios gvidi la Grupon al fruktoplana elvolviĝo.

La legantaro de nia revuo certe plezurigus kaj kuraĝigus al ĝia simpatia Prezidanto (profesoro pri historio kaj blindulo), amase sendante salutojn, bondezirojn, kaj ankaŭ, se eble, materialon (gazetojn, afiŝojn, propagandilojn, ktp) al adreso: S-ro L. Sauvaigo, 23 Rue de la Turbie, Principauté de Monaco.

Norda Rodezio

En Nkana-Kitwe, unu el la plej nordaj urboj de la Centra Afrika Federacio (Norda Rodezio, Suda Rodezio, Niasalando), oni komencis Esperanto-klubon nomatan „Tut-Rodezio Esperanto Societo”. Ankoraŭ ne estas multaj membroj, sed la jam aliĝintaj renkontiĝas almenaŭ unu aŭ du fojojn semajne. Verŝajne en 1956 ekestos loka Esp-revuo. Oni dissendas ĉiumonate Esp-novajleteron al preskaŭ ĉiuj gazetoj en suda, orienta kaj okcidenta Afriko, kaj al multaj delegitoj, kiel ankaŭ al siaj propraj membroj. Ĉar oni ne havas multe da propaganda materialo, oni petas al la esperantistaro sendi superfluan materialon al: Tut-Rodezio Esperanto Societo, C 6, room I, Nkana, Norda Rodezio.

Polujo

Pro la senĉesaj klopodoj de Prof. Mieczyslaw Sygnarski, kaj pro la pasintjara sukceso en Montevideo, restariĝis dum oktobro post pli ol dujara ĉesigo la Esperanta lektorato en Jagiellona Universitato, Kraków. La unuan prelegon ĉeestis 52 gestudentoj el diversaj fakultatoj, sed poste aliĝis al la kurso sume 82: duoble pli ol antaŭ la intermito. Absolute mankaŝ lernolibroj, sed prof. Sygnarski uzas la faman Cseh-metodon kun granda sukceso. Dume li klopodas eldonigi pere de ŝtata eldonejo sian nove prilaboritan lernolibron kaj ankaŭ sian novan tradukon de la junular-romano „En la dezerto kaj praarbarego” de Sienkiewicz.

★

La redaktoro de la antaŭmilita „Ĉielarka Standardo” — internacia kooperativa gazeto — havas okazon denove ekpropagandi kaj ekuzi Esperanton en ĉiuj kooperativaj centrejoj de sia lando, kondiĉe ke li ricevos interesan materialon senpere de la apartaj lokaj koop-societoj kaj organizaĵoj el la tuta mondo. Precipe tamen estas dezirataj informoj pri la laboristaj kooperativoj de produktado, de kolektiva laboro kaj de koop-servoj. Skribu amase al la adreso: Johano Zawada, Warszawa 21, ul. Pruszkowska 6.m.28, Polujo.

Svislando

Okaze de la elekto de la svisa parlamento elektiĝis kiel Nacia Konsilanto s-ro E. Schwendinger, Herisau, prezidanto de la loka Esperanto grupo.

Turkujo

Nia redakcio ricevis leteron de s-ro Muharrem Yumuk en Istanbul, kiu raportis, ke niaj samideanoj turkaj, luktante kontraŭ malfacilaj lokaj kondiĉoj, tamen fervore laboras por nia afero. Inter alie, pluraj artikoloj priesperantaj de s-ro Hasan Kocaman aperis en la jurnalaj „Dünya” kaj „Anajurt”, kaj vekis intereson inter la legantoj.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Ohana. Sylvia, Ludoviko-Lazaro kaj Jocelyne, infanoj de nia Delegito en Marrakech, Maroko, s-ro Ben Sion Ohana, ricevis fratineton Margalith.

Jubileoj

Sustr. Seninterrompe 25 jarojn kluba prezidanto fariĝos la 23an de januaro 1956 s-ro Jaroslav Sustr en Praha. La unuan fojon li estis elektita al tiu funkcio en 1931. Sinceran gratulon!

Jenkins. S-ro David W. M. Jenkins en Toronto, Kanado, baldaŭ estos 50 jarojn esperantisto.

NEKROLOGO

Cufo Basté. Lastatempe forpasis la fervora samideano *Francisko Curto Basté*, el Barcelona, kiu plurlare laboris tre favore al Esperanto. Lia familio komunikas la malĝojigan sciigon al tutmonda esperantistaro, kun kiu la mortinto vaste korespondadis.

Jackson. Pastro *Howard M. Jackson*, membro de U.E.A. ekde 1937, pastro de Metodista Preĝejo en Tadcaster, Anglujo, bedaŭrinde forpasis. Al lia vidvino sinceran kondolencon.

Merrick. Mortis s-ro *P. W. Merrick* el Shepperton, Anglujo, kiu faris multon por la blindaj esperantistoj. Eĉ ĝis oktobro 1955 li brajligis la himnojn por ilin sendi al kelkaj blinduloj, kiuj ĉeestis la Esperantajn Diservojn en Londono aŭ legis hejme la himnojn je la horo de la Diservo. Tiu laboro estis tre streĉa por li, aparte post la nova eldono de la Himnaro, ĉar pro ŝanĝoj en diversaj himnoj li devis refari metalajn klišojn por la reprodukto de paperaj kopioj. Multaj amikoj lin kore funebrias.

William Blake (1757-1827)

LA TIGRO

*Tigro, tigro, brile brula
en arbaro nokt-obskura,
forĝis kia man' eterna
vin je simetri' konsterna?*

*En kia fundo aŭ ĉielo
ardis via okulhelo?
Kia lin flugil' subtenis?
Kia man' la fajron prenis?*

*Per kiaj ŝultro kaj kompreno
por vi tordiĝis kortendeno?
Kaj kiam pulsus batoj koraj,
kiaj pied' kaj mano gloraj?*

*Kia martelo? Ĉeno kia?
Kia forn' por cerbo via?
Riskis kia fort' kolosa
spiti al terur' ambosa?*

*Kiam steloj sin malarmis
kaj sur la ĉielon larmis,
ĉu la verko al li karis?
Ĉu vin ŝafid-farinto faris?*

*Tigro, tigro, brile brula
en arbaro nokt-obskura,
forĝus kia man' eterna
vin je simetri' konsterna?*

El la angla: W. Auld

Oficeja Kronika

La Administra Oficejo

Sur la kovrilo de tiu ĉi numero prezentas sin al la anoj de UEA la bela nova Oficejo de la Asocio, en Eendrachtsweg, Rotterdam.

La Administranto

La administrajn aferojn de la Asocio gvidas la kapablaj manoj de nia fervora f-ino M.H. Vermaas, kiu kiel komitatano jam pruvis sian vigecon kaj talenton. Nia ĉarma administranto venkis preskaŭ nekredablajn malfacilaĵojn dum la translokigo de la oficejo el Anglujo, sed frontis al ĉiuj minacantaj obstakloj kun neperturbeblaj bonhumoro kaj aplombo.

La Oficistoj

Kun la Administranto laboras en la Oficejo tri entuziasmaj esperantistoj.

S-ino Lokker fariĝis esperantisto antaŭ nur kelkaj jaroj, sed tuj fervoriĝis. Ŝi tre ĝojas, ke ŝi



F-ino Vermaas

Foto Cas v. Os

povas labori en la Oficejo de UEA, kaj volonte lasis por tio postenon en komerca entrepreno, „ĉar,” — laŭ ŝia propra diro — „ŝi multe preferas labori en idealista medio”.

S-ro Driesen, nia tre sperta kaj kapabla librotenisto, estas filo de tre malnova roterdama esperantisto, kaj mem de multaj jaroj parolas la lingvon. Ankaŭ li lasis postenon en la komerco por labori ĉe ni, ĉar ankaŭ lin animas profunda amo al nia afero.

F-ino Veldhuyzen estas filino el esperantista geedzeco dana-nederlanda, kaj jam kiel tre juna knabino bonege parolis la lingvon.

Nia Revuo

Dum la periodo, kiam s-ro Rossetti redaktis tiel bone nian revuon, li iniciatis la ideon, pligrandigi ĝian formaton, kaj kun la entuziasma aprobo de la

Estraro li faris la unuajn paŝojn al efektivigo de tiu ideo. Nia nuna redaktoro transprenis de s-ro Rossetti tiun decidon, kaj en plena konsento finfaris la preparojn. Hodiaŭ la legantoj vidas kaj povas mem juĝi la rezulton.



F-ino Vermaas, S-ino Lokker kaj s-ro Driesen Foto Cas v. Os

Nova presisto

Kun la transiro de la oficejo al Nederlando estis, pro praktikaj kaŭzoj, absolute necese transiri ankaŭ al nederlanda — kaj precipe roterdama — presisto, malgraŭ la fakto ke nia Redaktoro troviĝas en Britujo.

Ni estis tiel feliĉaj, trovi tre kompetentan presiston je dekminuta distanco de la oficejo, kiu ne nur presos nian organon iom pli malmultekoste ol la brita, kiu ne nur povos prezenti eĉ pli grandan kaj modernan elekton de litertipoj, kiu ne nur povas plenumi ĉiujn teknikajn postulojn de nia redaktoro, sed kiu krome jam de kvindek jaroj presas esperantaĵojn, broŝurojn, vortarojn, lernolibrojn, k.t.p. Lia lasta granda mendo estis la presigo de „Aktualaj Problemoj” de Prof. Lapenna. La juna generacio en tiu ĉi firmao akceptis nian mendon kun granda entuziasmo. Ĉi tiu unua numero estas kvazaŭ lia vizitkarto.

Ni ne dubas pri longa, agrabla kunlaboro kun la presejo Zwagers.



F-ino Veldhuyzen kaj s-ro Driesen

Foto Cas v. Os

41-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago - Danlando

4. aŭgusto - 11. aŭgusto 1956

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2

Decembro 1955

Adreso: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

Banko: Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

Poŝtĝirkonto: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.

Aliĝoj: Oni povas aliĝi per la oficialaj perantoj aŭ rekte ĉe la 41-a Universala Kongreso, Kopenhago. Oni sendu la pagon al sama instanco, al kiu oni sendas la aliĝilon. Aliĝo kaj pago okazu samtempe. Ek de la 1-a de januaro la kotizo estos danaj kronoj 43,—, edzino 21,50, gejunuloj 14,50, studentoj 21,50. Individuaj membroj de UEA rajtas rabaton 7,—, edzino de kongresano 3,50.

Karavanoj: Ĝis nun la jenaj Landaj Asocioj anoncis karavanojn:

Franca Esperantista Unuiĝo, 34 rue de Chabrol, Paris 10, Francujo.

Germana Esperanto-Asocio, Bergisch-Glad, Bacherstr. 1095, (22c) Köln-Dellbrück, Germanujo.

Itala Esperanto-Federacio, Casella Postale 248, Torino, Italujo.

Fakaj Kunvenoj: Ĝis nun anoncis fakkunvenon la jenaj asocioj: Internacia Komisiono „Esperanto kaj Sociologio” Moerweg 76, Den Haag, Nederlando.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 183 Woodlands Park Road, Bournville, Birmingham 30, Anglujo.

Studenta Esperanto-Klubo, Maendalsvej 39, Kopenhago, Danl.

Kongresa Glumarko: Ĝi estas aĉetebla ĉe Landaj Asocioj aŭ rekte ĉe la 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

Infana Kongreseto: Povas partopreni Esperanto-parolantaj infanoj de 6 ĝis 13 jaroj. La infanoj loĝas, manĝas kaj estas okupataj en la infanĝardeno „La Ludoĉambro”. Aparta programo aperos kaj

estos sendata al interesigantoj. Aliĝo al U.K. estas deviga. Prezo por la restado (7 tagojn) danaj kr. 70,—. Tiu sumo estu pagata plej malfrue 30/6 — 1956. Limdato por aliĝo kiel por U.K.

Kongresejo: La Teknika Universitato en Kopenhago estos Kongresejo de la 41-a Universala Kongreso.

Inaŭguro: Ĝi okazos en la nova koncertsalono en la mondkonata parko „Tivoli”. La konstruaĵo estos la plej moderna el la tuta Skandinavio.

Statistiko: (ĝis fino de novembro) Anglujo 22, Aŭstralujo 1, Aŭstrujo 2, Belgujo 2, Brazilo 3, Danlando 58, Finnlando 6, Francujo 29, Germanujo 18, Hispanujo 6, Islando 1, Italujo 37, Kanado 2, Jugoslavujo 30, Nederlando 13, Norvegujo 15, Nov-Zelando 1, Svedujo 31, Svisujo 7, Usono 4.

Sumo: 288 el 20 landoj (pasintjare: 213 el 20 landoj).

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

INTERNACIA KONKURSO 1955

Stato je la 30-a de Novembro

| Lando | Kvoto | Poentoj | % |
|-----------------|-------|---------|--------|
| 1. Jugoslavio | 1750 | 2629 | 150.2 |
| 2. Usono | 2300 | 3322 | 144.4 |
| 3. Izraelo | 250 | 330 | 132 |
| 4. Japanujo | 900 | 1182 | 131.6 |
| 5. Maroko | 750 | 937 | 124.9 |
| 6. Aŭstrujo | 1200 | 1485 | 123.8 |
| 7. Svedujo | 5900 | 6893 | 116.8 |
| 8. Germanujo | 3700 | 4275 | 115.5 |
| 9. Francujo | 5100 | 5869 | 115 |
| 10. Kanado | 300 | 345 | 115 |
| 11. Aŭstralio | 1000 | 1145 | 114.5 |
| 12. Finnlando | 2500 | 2860 | 114.4 |
| 13. Hispanujo | 1600 | 1815 | 113.4 |
| 14. Danlando | 2500 | 2765 | 110.6 |
| 15. Nederlando | 4600 | 5074 | 110.3 |
| 16. Urugvajo | 300 | 330 | 110 |
| 17. Svislando | 1600 | 1740 | 108.75 |
| 18. Nov-Zelando | 800 | 854 | 106.7 |
| 19. Italujo | 2900 | 3025 | 104.3 |
| 20. Brazilo | 6400 | 6655 | 103.9 |
| 21. Belgujo | 2100 | 2126 | 101.2 |
| 22. Portugalujo | 500 | 495 | 99 |
| 23. Norvegujo | 2200 | 2142 | 97.3 |

| | | | |
|---------------|------|------|------|
| 24. Islando | 350 | 330 | 94.3 |
| 25. Sudafriko | 350 | 305 | 87.1 |
| 26. Meksikio | 350 | 210 | 84 |
| 27. Britujo | 9200 | 7608 | 82.7 |
| 28. Sarlando | 250 | 180 | 72 |
| 29. Irlando | 250 | 160 | 64 |
| 30. Kubo | 250 | 150 | 60 |

20.000 atingita!

En la momento de presado la membronombro de U.E.A. estas: 20 427

Ek al 30.000!

Informo

La apero de tiu ĉi numero pravas, ke pri la prokrasto de la decembra numero kulpas ne nia Redaktoro. Estas la ĝisnuna pre-sisto, kiu pro nekonataj kaŭzoj prokrastis tiun numeron dum tri semajnoj.

M.H.V.



NOVAJ LIBROJ

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

* = ricevebla ĉe U.E.A.

ofte de tiu speciala speco, kiun oni nomas humoraĵo, aŭ almenaŭ tre proksimaj al ĝi.

Vere bona rakonto, ĉu romano ĉu rakonteto, estas unika afero, kiun oni ne povas anstataŭigi per alia, kiel oni ankaŭ ne povas anstataŭigi ĝiajn detalojn per aliaj detaloj. La noveloj el la maniko apenaŭ estas de tiu speco. Leginte kelkajn novelojn mi povis konstati nur tion, ke la rakontoj ne tre kaptas mian atenton. Unu certa novelo kun ĝiaj homoj kaj okazoj povus cedi sian lokon al alia kun aliaj homoj kaj okazoj, kaj la impresoj al la leganto malmulte diferencus, almenaŭ laŭ profundeco. La pli granda parto de la libro efektive ŝajnis kaj ŝajnas al mi konsisti el bagateloj. Tio ne estas kondamno, nur prijuĝo. Ankaŭ bagateloj povas esti bonaj, en sia speco eĉ majstroverkoj.

Mi daŭrigis la legadon, kaj io stranga okazis. Subite mi rimarkis, ke mi legas kun intereso, kun firme kreskanta propra partopreno en la aferoj. La libro kaptis min. Verdire mi trovis ankaŭ paĝojn, kiujn mi ne povus anstataŭigi per aliaj, sed tio ne estis esenca kaŭzo de mia ŝanĝita rilato al la novelaro.

Kio do estas la kaŭzo de tiu efiko? Mi ne povas funde klarigi ĝin, sed ŝajnas al mi, ke ĝi esence konsistas el certaj personaj ecoj ĉe la aŭtoro — kiujn oni jen kaj jen momente perceptas rigardante kvazaŭ *tra* la rakonto al la rakontanto mem — en kombino kun granda lingvoĝojo. Oni diras pri certaj muzikistoj, ke ili havas ludoĝojon. Tiam ĝojon en la uzado de la lingvo, kaj la uzadon karakterizas majstra regado de la arto de esprimado, elradias la libro de Rossetti, kaj oni estas kaptata de ĝi same kiel oni estas kaptata de la ludoĝojo de bona muzikisto. Kaj la ecoj estas interalie animpuriga memironio kaj profunda sed neniam demonstrata, plej ofte kaŝata, homeco.

Nun tuj post tralego mi ne kapablas vere prijuĝi la libron, ĝi fakte estas, malgraŭ bagatelaj rakontoj, sufiĉe komplikita libro, kaj tial mi povas diri nur, kian efikon ĝi faris al mi. Kaj tiu efiko estas bona. Mi kredas, ke la lingva vivo en tiu ĉi libro povus doni novan vivon al multaj lacaj esperantistaj animoj.

En la volumo troviĝas du lingvo ŝercaj prozaĵoj, La neologismologio kaj La

Esperanta vortludo. Persone mi ne ŝatas vortludojn de la plej simpla konstruo kaj ĝi ja estas la plej ordinara, sed mi kun ĝojo legis la traktajojn de Rossetti. Ili fakte pliriĉigas nian esperantolingvan konscion, kaj foje la ŝercoj tuŝas punktojn, kie oni povus rekte transiri al serioza plua pritrakto.

La du lastaj kaj pli longaj rakontoj estas detektivaj. Ŝajnas al mi, ke ili restas meze inter vera detektivrakonto kaj parodia. Rossetti kredeble povus verki pure parodian rakonton de tiu speco. Tia estus tre bonvena.

La sorĉisto do finfine restas neforigebla de tiu ĉi libro. Certe li faras siajn artifikojn ne por montri sian lertecon. Li faras ilin, ĉar li estas kaptita de nerezistebla amo al la magia arto kaj de granda ludoĝojo. Li sorĉas ankaŭ por distri kaj gajigi sian publikon kaj fine ankaŭ por krei vojon de koro al koro. Bagateloj — sed samtempe magiaĵoj siaspece unikaj. Kaj kio estas pli?

There are nine and sixty ways of constructing tribal lays and every single of them is right!

En la libro troviĝas kelkaj, tre malmultaj, preseraroj. Ili ne erarigas, kaj la leganto povas mem korekti ilin.

Post *prefer*, p. 11, lin. 5, direktoformo ne estas bezonata. Sampaĝ-, lin. 4 de malsupre, mi malgraŭ iama ekzemplo *preferus direktilo* anstataŭ *guidilo* (de biciklo).

La eldonisto meritas laŭdon pro bela tipografio. Unu afero ne plaĉas al mi, sed eble temas pri persona gusto. Ĉiu novelo havas novan titolpaĝon, kaj antaŭ ĝi estas eventuale unu senteksta paĝo foje eĉ pli. En kiu ajn libro tia arango impresas al mi, kvazaŭ oni provus plivalorigi la libron per abundo da papero.

S. E.

*Ferenc Szilágyi: *Koko krias jam!* Originala novelaro. Kovrilo de John Hartley. Portreto de la aŭtoro. STAFETO, belliteratura eldonserio, 4. J. Régulo, eldonisto. La Laguna, Kanariaj Insuloj. 1955. 16 x 22.5 cm. Paĝoj: 232. Prezo: 12 ang. ŝil. aŭ 1.80 us. dol. plus sendkostoj.

*Reto Rossetti: *El la maniko*. Belliteratura eldonserio Stafeto, n-ro 3. J. Régulo Perez, Kanariaj Insuloj. 1955. Prezo: 12 ang. sil.

La kovrilbildo de tiu ĉi libro, desegnita de la aŭtoro mem kaj de John Hartley, prezentas magiiston, kiu el sia maniko elsorĉas serion da kartoj, kiuj donas la titolon de la libro. Ĝi estas lerte kaj bone farita, tamen unuavide ne plaĉis al mi. Ĉar la aŭtoro mem pli malpli respondas pri ĝi, ĝi devas havi certan rilaton al lia propra koncepto pri sia verko. Ĉu li per tio volas montri, mi demandis min, kiel lerta li estas, aŭ ĉu li volas sugesti, ke lia arto estas ne serioza aktorado sed nur lerta ŝercado por distri la esperantan publikon?

Mi komencis legi la unuan novelon (la libro enhavas 15 originalajn prozaĵojn): Subite Ruk bremsis sian biciklon kaj kriis al Moŝ, kiu jam elglitis sur la longa deklivo: - - -

Bone! La leganto estas sen preparo jetata en la agadon kaj la medion de la rakonto, li scivoleme ĉirkaŭrigardas en sia nova mondo kaj provas orienti sin tie. Same bone la aŭtoro komencas ĉiujn novelojn kaj ankaŭ aliajn prozaĵojn.

La mallongaj noveloj estas momentaj bildoj, kiuj prezentas al ni diversajn homtipojn, diversajn animajn kvalitojn, okazadojn pli malpli sub la influo de hazardo aŭ sorto. La rakontetoj estas

KOKO KRIAS JAM! unualoke meritas atenton pro siaj novelartaj kvalitoj. La aŭtoro redonas la vivon precipe per agoj. La homojn li prezentas ne per portreto, sed ja per trafaj ekfotoj. La nultaj situacioj kaj okazajoj estas viglaj kiel filmo. Scenejoj kaj medioj bone sentigas sian atmosferon sen superflua detalpriskribo. Ĉio estas verkita kun entuziasmiga vervo kaj virtuoza, stimula lingvouzo. Szilágyi havas naturan talenton por tia rakontado kaj li multe laboris por akiri perfektan rakontmanieron. Tial li ĉiam trovas ankaŭ en la ordinara vivo kontentige da impresokreaĵoj aferoj kiujn aliaj, kvankam beletraj kleraj, ne trovas. Foje en foje, ŝajnas al mi, li uzas iom tro multajn, sed li kunmetas siajn rakontokonstruajn detalojn kun tiu dinamiko en la sinsekvo, kiun oni ververe trovas nur en altnivela kaj prestiĝa literaturo!

La unua libroparto prezentas sep novelojn:

La Flamsalamandro estas okazovigla, tipe novelarta rakonto, militorilata, foje krude reala, sed samtempe ankaŭ milda iom trista esprimo de subsentoj kaj subsopiroj. Aleksandro, la malvarma salamandro, fremdulo en la vivo, kredeble ne estas elektita kiel simbolo, sed ĝi nature fariĝas simbolo — esprimo de io nedireble mankosentiga, malplenosentiga, de ia dolora fremdosento, kio tamen estas nenio alia ol subsopiro al komuneco, al homamo en la mond' eterne militanta. Estas tiu sopiro por homeco kiu igas nin jesi la lastan frazon de la potenca finsceno: La suno ardis super la vekota tero.

Ankaŭ *"La Perdita Velo"* estas militrakonto. Drameca, ŝajne senperspektiva. Sed la perspektivo ja estas la protesto de la aŭtoro kaj la eho, kiun ĝi vekas en liaj legantoj.

Nila estas delikata observo pri kvarjara knabineto, verkita kun tiu simpatia bonhumoro, kiu havas nenion komunan kun la ordinara atablo de okaze molkora plenkreskulo. Ĝi estas pli ĝustadire: esprimo de profunda kompreno.

La Sekreto de la banko estas amuza, tamen akra satiro pri la panaktraĵoj friponaĵoj en la homa socio dum tempo de malbona konjunkturo. Gajiga pro la sprita prezento; interesa pro la surpriza malvolviĝo; serioze pripensiga pro la donitaj problemoj de socia etiko.

La sama etiko estas ankaŭ la ĉeftemo de *"Estas bone tiel"* — nebulogriza trista filmo pri mizerula vivo en krizotempo, en kiu laborista, homa solidaro efikas kiel freŝa nebulosira ventopuŝo.

La Vekiĝo estas gaja junula aventuro kiu sentigas la guston de bela, homa travivaĵo. Ĝi estas rakontita en bombokelo dum flugatako. Eksplozo mortigas la rakontinton. Troviĝas nenia sentimentaleco en la rakonto. Ĝi ne estas esprimo de fatalismo aŭ forkurismo, sed male, de ideofidela, daŭrigopreta spito.

Koko krias jam, la titolverko, pentras la dilemon de komercisto, kiun angora militosceno devigas elekti inter mem-

intereso kaj homamo. Kun profunda efekto la aŭtoro rekonstruas la momenton kiam tiu homo, nun mondkonata, staras antaŭ Rubikono kaj ĝin transiras...

La dua libroparto *"Per ĉarita vento"* ne estas artopretenda, kvankam ankaŭ ĉi tie pluraj pecoj sugestas kaj vaston kaj profundon. Ĝi prezentas bildojn el la esperantista vivo kun sprita, jen ironia, jen joviala bonhumoro. Eĉ kiam nuraj ŝercoj, tiuj bildoj tamen havas valoron, ĉar ili bone kompletigas la portreton de la aŭtoro, kiu estas krom belisto ankaŭ senlaca gajiganto kaj stimulantulo, homo de la movado, kiu sentigas, ke estas NIA torĉo, kun ni devas pluporti. Bona, tre bona samideana libro! La lingvo, zorge kontrolita de la literatura kom. de SAT, estas senriproĉa. Klara preso. Aĉetu ĝin!

L. C. Deij.

La Fianĉino de Olivetan, Denise Hourticq. Tradukita de A. Bachelier, 10 multobligitaj paĝoj. 1 rpk. ĉe La Ponteto, avenue Debidour 2, Paris 19, Francujo.

Unuakta teatraĵo, kies originalon premiis la Evangelianiga Komisiono de la Valda Reformita Eklezio. Ĝia temo estas epizodo en la vivo de Petro Robert, alnomata Olivetan, kuzo kaj kolego de la reformisto Calvin. La verketo, kiu aperas ĉi tie kiel speciala numero (Jan., 1955) de la organo de la franca sekcio de KELI, ŝajnas lingve kaj drame bona.

***La Nica Literatura Revuo**, dumonata revuo. Unua jaro, n-ro 1. septembro, 1955. Jarabono 8\$ 3p. Redakcio: 7 avenue Goudault, Choisy-le-Roi (Seine), Francujo, Administracio: 5 boulevard Stalingrad, Nice (A.-M.), Francujo.

Oni ne povas diri, ke tiu ĉi nova revuo estas luksa laŭ ekstero. La papero estas bona, sed ĝi estas videbla la produkto de preseio honesta, sed kun simplaj rimedoj. Oni tamen manĝas ne la nuksoŝelon, sed la kernon. Kia estas la kerno de ĉi tiu nukso?

Jam sur la kovrilpaĝo pompas nomoj, kiuj nepre imponos al konantoj kaj ŝatantoj de nia literaturo — kaj, malgraŭ skeptikuloj, tiaj ne malabundas. Ĉefredaktoro: G. Waringhien; redakta komitato: Roger Bernard, J. Régulo Perez, Tomàs Pumpr, Reto Rossetti, Ivo Rotkvič, Raymond Schwartz. Ĉu sufiĉe?

Ni trafolui la unuan numeron. Originala soneto kaj traduko el Petofi; ambaŭ de Kalocsay, ambaŭ novaj. Waringhien salutas per kortuŝa soneto la reaperon de sia kinulo en tiu fruktodona duopo. Poemo de Marjorie Boulton; novelo de Raymond Schwartz, ĉasta sed tipe spritorieca. Artikoloj de I. Gomes Braga, Szilágyi, Georges Avril; infanrimaĵoj de iu inversigita animo nomata Oter Itesor; artikolo pri Mihalski de W. Auld; de Waringhien pri la franco Bellay, kun 12 tradukoj el ties poemoj; traduko de Miloš Lukáš el Capek; de Pumpr el la operlibretisto Ponte. Jen riĉaĵoj en simpla vesto!

Gerald C. Jervis.

Provinca Gastejo: Bojidar Trudić. Serbia Esperanto Ligo, Belgrade. 28 pp. broŝurita.

"Estu bonvenintaj" nomiĝis la provinca gastejo; ja estu bonveninta la nova entrepreno de la Serbia Esperanto Ligo, kiu volas eldoni tutan serion de tiaj malgrandaj libroj, kun originalaĵoj, tradukaĵoj kaj libroj pri historio kaj arto. La unua libro en la serio estas bone presita, sufiĉe bonstila; kaj la libroj en la serio ŝajne estos tiel malmultekostaj, ke oni facile povos akiri stokon kiel legolibrojn por postkursaj klasoj, kiel donacetojn, k.t.p.

Provinca Gastejo estas simpla, fantazia novelo pri am-aventuro; la historio, tre malprobabla, tamen konvinkas dum ni legas, pro ia kvazaŭ folkloro, legenda kvalito kaj per la tre bona, konsekvenca konstruado. La novelo eble ne taugas, pro la amafera temo, por lernejaĵoj; sed por maturaj homoj ĝi estas ĉarma, amuza kaj perfekte delikata. La aŭtoro konfesas ke li verkis "nur por amuzo kaj distriĝo", kaj por tia celo li bone sukcesis. Jen libro malgrava, sed, konsiderate kiel malgravaĵo, meritplena.

Marjorie Boulton.

Akutagawa-Ryunosuke: **La Kapao**. Tradukis: Nozima-Yasutaro. Eld: Japana Esperanto Instituto, Tokio.

La Kapao estas novelkolekto tradukita el la japana. Krom la titolnovelo, kiu estas longa, estas en la libro tri nelongaj rakontoj. En la fino troviĝas informoj pri la aŭtoro (1892-1927), kiu estis elstara verkisto en Japanujo.

Kapao estas japana fabela besto. La rakontanto de la novelo hazarde venas en la landon de la kapaoj, kiel Gulliver iam venis en landon de ĉevaloj. Same kiel la verko de Swift ĝi estas kritiko de sociaj aferoj kaj homaj stultaĵoj, same ĝi ankaŭ estas elfluo de la pesimisma vivrigardo de la verkinto. Oni ne dubas pri la sincero en la ironia prezentado, nek pri la malhelaj sentoj kaj pensoj de la aŭtoro (li fine mortigis sin mem!). Tamen la efiko de la rakonto al la leganto estas neforta. Alilandano verŝajne ne komprenas ĉiujn aludojn, kaj verŝajne la originalo parolas pli impresive ol la traduko, sed tio certe estas ne la ĉefa kaŭzo de la impresio. Ŝajne la rakonto estas rapide farita skizo, sen la profundo kaj pezo de vere tralaborita kaj finlaborita verko.

La tri aliaj rakontoj tre plaĉas al mi. Ili ŝajnas tute japanecaj, estas tamen samtempe ĝenerale homaj, legeblaj same bone kie ajn. En ili estas, ĉio en sia loko, bonhumoro, homeco, saĝo, profunda melankolio. Estas plenviva rakontarto, kiu ne bezonas pledanton. Ili kaptas kaj koron kaj racion, kaj ili kaptas nin plene. Ni ĝojas pro la japaneca en ili, kaj nia animo ekvibras pro la universala en ili, kio kunligas nin kun ili kaj ilia verkinto. Tio estas ne nur japanaj figuroj, estas ankaŭ mi kaj vi.

S. E.

Belarta Konkurso 1955

Originala Dramo: Unua Premio

Marjorie Boulton

Ce l'akvo de forgeso

Dediĉita al Karola Rossetti kaj Ljuba Lapenna

LA GARDISTOJ DE LETEO
EŬRIDICO
ORFEO

Sceno: Hadeso. Senkolora mondo. Malvarma, blueta lumo. Sur la fono ni vidas nigrajn, senfoliajn arbojn kiuj ne moviĝas. Maldekstre, la du GARDISTOJ DE LETEO sidas sur digeto kovrita per preskaŭ nigra herbo. Ĉe la piedoj de la unua staras nigra pokalo. La GARDISTOJ DE LETEO estas nigre vestitaj en longaj grekstilaj roboj, kun manteloj; kaj ili portas nigrajn okulmaskojn. Ili parolu kaj gestu kiel eble plej maŝinece, sensekse kaj nehome

GARDISTOJ DE LETEO

Ni estas neo,
ni estas seno.
jen malkreo,
jen reveno.
Ni estas seno,
ni estas neo,
jen la sereno
de Leteo.

Rivero fluas
en Hadeso
kun nigra kreso,
sed ne bruas
Ni estas neo,
jen maljeso,
jen forgeso,
jen Leteo.

Ni estas Neo,
Finfina Fino,
jen malgeo
por vir kaj ino;
jen Leteo
jen forgeso;
Ni estas neo
kaj regreso

(Angora kriego de virino aŭdiĝas.)

DUA GARDISTO

Nova animo venas laŭ fatalo

UNUA GARDISTO

Mi pretas, preta staras la poka!
Venu l'animo fremda

DUA GARDISTO

Ne — kontraŭel!
Mi konas ĝin Mi vidis ĝin antaŭe

UNUA GARDISTO

Antaŭe? Kiel?

DUA GARDISTO

Jen la dua vico
De l'eksmortinta ino, Eŭridico,
Kiu transiris nian Stiksan bordon,
Renversis faton kaj la kosman ordon,
Forgesis la forgeson de Leteo,
Savita per la kanto de Orfeo,
Kies muziko la inferan reĝon
Sorĉis, renversis mian feran leĝon.

(EŬRIDICO evenas dekstre. Si aspektas preskaŭ normale homa. Si portas grekan virinan robon, palrozokoloran: ora rubando ligas ŝian hararon. Si tenas floron en la mano. (Sovaĝa rozo tre taŭgas, sed ia ajn bela sovaĝa floro taŭgas.) Kiam ŝi aperas, la scenejo iom heliĝas. EŬRIDICO senespere kaj fikse rigardas dekstren dum la GARDISTOJ parolas.)

UNUA GARDISTO

Sed la muziko ne tre longe fortis.
Eksmorta, ŝi revenas; ŝi remortis.

DUA GARDISTO

Kontraŭ la radturniĝo de la Fato
Potencas nek muziko nek Amato
Ĉio okazas, kio plej konvenas.
Ŝi iris; jes; sed vidu, ŝi revenas.

UNUA GARDISTO

La nigra reĝ' eltrovis la kondiĉon
kiu detruos tian rab-feliĉon.
Tion atendis mi. L'amanto ardis,
Kontraŭ kondiĉo, frue ŝin rigardis,
Ŝin perdis.

DUA GARDISTO

Dua morto tuj ŝin frapis.
Bone

UNUA GARDISTO

Neniam vere ŝi eskapis
(EŬRIDICO finfine ĉesas rigardi dekstren: ŝi ekriĝardas la GARDISTOJN kaj parolas plorante.)

EŬRIDICO

Revidi lin, remorti — ho angoro!
Nenio restas, krom la tera floro
kun mi plukis kiel memorilon,
kiam mi perdis la vivantan brilon
de l' tero ĉe la lumo de l'infero.
Orfeo! Ho karega! ho mizero!

UNUA GARDISTO

Jen fino de la kontraŭleĝa rabo.

EŬRIDICO *(tenere sed angore)*
Orfeo! Ho, senpacienca knabo!
Ho kara, kara, kara mia edzo!
Ho, kara eĉ en fuŝo kaj stulteco!
Ho, kara! — Kiel inoj povas plendi?
Viroj ne tre kapablas por atendi.
Ho, kara! vi ne povis! mi komprenas.

UNUA GARDISTO *(moke)*

Saluton, Eŭridico, Vi revenas.

EŬRIDICO

Jes.

UNUA GARDISTO

Kaj vi ne plu kisos, ne plu kveros.

(Paŭzeto. La mokemo de la GARDISTO kvazaŭ stimulas Eŭridicon al defio. Ŝi videble penas regi sin.)

EŬRIDICO

Tamen, mi ne ankoraŭ senesperos.
(Ŝi sidiĝas.)

UNUA GARDISTO

Vi du ne povis venki vian sorton.

EŬRIDICO

Ankaŭ Orfeo iam trafos morton.

DUA GARDISTO

Nepre. Kaj jen la fino de l'rakonto.

EŬRIDICO

Ne, Se Orfeo estas ja mortonto,
Kiel li estas, sur la certa vojo
Mi lin atentos, en humila ĝojo.
Virinoj pli kapablas por atendi.
Mi paciencos. Devos li descendi.
(LA GARDISTOJ DE LETEO ridaĉas nehome kaj metafale.)

EŬRIDICO

Ni vivas aŭ malvivis laŭ fatalo.
Vivo, malvivo, estas nur detalo.
Nun mi akceptas: ni ekzistu sune,
lume, senlume; sed ni restu kune.

UNUA GARDISTO

Vi miskomprenas.

DUA GARDISTO

Ne naive stultu.

UNUA GARDISTO

Leĝoj vin ligas, ino.

DUA GARDISTO

Jes, aŭskultu.

UNUA GARDISTO

Vi volas venki faton, malhumile

DUA GARDISTO

Vi lin revidos, jes, sed senutile.

UNUA GARDISTO

Kiel vi amos lin sen viva karno?

EŬRIDICO

Spiritoj eble amos dum eterno.
Surtere, eĉ, nin ligis mensa ligo
malpli kaprica ol la korp-instigo.

UNUA GARDISTO

Vi estas morta nun, ne plu edzino.

DUA GARDISTO

Sciu: jen punkto! jen la fina fino!

EŬRIDICO

Li mortos. Do, li venos. Kaj mi sidos
Ĉi tie, ĝis Orfeon mi revidos.

UNUA GARDISTO

Sed nun vi restas disaj; ĉu vi ne
sentas doloron akran?

EŬRIDICO

Ve, ho ve!
Tamen, suferos mi en pacienco:
Li venos, mia sola rekompenco.

UNUA GARDISTO

Pal inoj mortaj, same kiel vivaj,
ŝajnas ankoraŭ blindaj kaj naivaj,
rifuzas eĉ gustumi l'akran veron
pacigan kaj majestan senesperon.
Viaj doloroj estas nur la vanaj
esperoj, la turmentoj plej tiranaj
de l'homa viv': alfrontu la realon;
ne plu suferu; prenu la pokalon.
(*Li prezentas al EŬRIDICO la nigran
pokalon.*)

Trinku denove el eterna Neo;
Senesperigu; trinku el Leteo.
Tero kaj tera amo plene foros,
Kaj via kor' neniam plu doloros.
(*EŬRIDICO etendas la manon por preni
la pokalon, sed vidas la floron kiun ŝi
ankoraŭ tenas.*)

EŬRIDICO

Mi pensis pri perfido, eta floro;
Ne; en mizero fortu memorol
(*Ŝi rifuzas la pokalon.*)

DUA GARDISTO

Trinku; forgesu; tio vin konsolos

EŬRIDICO

Se mi ne volas?

UNUA GARDISTO

Vi tre baldaŭ volos!

EŬRIDICO

Forgesi ĉiun elokventan tuŝon
de liaj manoj? - - - lian dolĉan buŝon?
La brakopremon kiu tiel ravas?

UNUA GARDISTO

Kisojn en nia lando ni ne havas.
Forgesu, aŭ, spirito jam senrenta,
vi vagos en deziro plej turmenta.

EŬRIDICO

Mi, memorante korpan dialogon,
por amo trovos ilon kaj apogon.
La karnaj korpoj estas nur pronomoj.
Klarigas la rilatojn de la homoj;
Simbolas ilin, helpas por distingo;
Nun ni parolos per alia lingvo.
Mi devos suferadi ĝis li venos;
Mi lin memoros, ĝis revido benos.

UNUA GARDISTO

Via mizera homa intelekto
ne konas la signifon de l'elekto.

DUA GARDISTO

Forgesu! — Aŭ memoru, sed, por puno,
larmu eterne en senĉesa nudo.

EŬRIDICO

Ah, jam mi torturiĝas pro la diso!

UNUA GARDISTO

Komencu! Trinku!

EŬRIDICO

Ah, la lasta kiso!
La lasta sveno post la serpentmordo!
Engluta nigro de l'inferopordo!
— Tamen, li venis serĉi min; kaj li
denove venos.

UNUA GARDISTO

Kava iluzi'!

Li venos; jes; kaj trinkos; kaj forgesos
tuj; eĉ se vian amon vi konfesos,
li ne komprenos plu. La iluzio
forflugos - - - ĉia vana tera scio.
Komprenu ke li ne plu estos viro;
Vi por eterne daŭros en sopiro
al ombro, daŭros en dezir' turmenta
por io nigra, surda kaj silenta.

EŬRIDICO

Ne - - - ne - - - sed jes, vi konas ĉion,
vere

parolas - - - forgesite, senespere
vivi - - - ne plaĉi plu al li - - ho ve!
ne esti mi, ne koni lin - - -

(*Ŝi kovras la vizaĝon per la manoj kaj
kaj silentas dum momento. Poste, ŝi
stariĝas, kun defia digno.*)

- - - Sed nel!

Nel! vi, en via senkolora samo,
Kion vi scias pri la homa amo?
Amo ne estas kiso kaj kareso,
ĝi estas la tuthoma vivojeso,
per tuta korpo kaj per ĉiu senso,
per tuta koro kaj per tuta menso,
Aliformanto de la viv'; plenumo
kaj pelo, la aero kaj la lumo,
Oftega kiel akvo; kaj pli kara
ol diamanto, aŭ smeraldo rara;
ĝi min fortigis, hardis per doloro;
per ĝi mi kredas al la vivvaloro;
jen; mi ankoraŭ amas; do, sen timo,
amo validas preter l' vivo-limo!
Ni ambaŭ vivis lian vivon, mian,
vivis du vivojn, tiel kreis trian;
Ni kvazaŭ du riveroj en la maro
ekzistas en sinperdo, estas paro;
en ambaŭ restas rezistivaj memoj;
en am' troviĝas fuŝoj kaj dilemoj;
jes; ni suferis, ni eraris, sed
duope, en rezisto aŭ en ced'
en la duop' ankraŭ mi duonos;
se volos li forgesi, mi pardonos,
ĉar mi komprenos; li suferas same
kiel l'edzin', dise kaj ĉiam ame - - -
sed amo restos mia vivocelo;
se mi ne vivas, tamen en fidelo
mi daŭru!

UNUA GARDISTO

Tamen, nun vi estas morta.
Sen am', Hadeso estos tre komforta.
(*Li denove proponas la pokalon. EŬ-
RIDICO turnas la dorson rifuzante.*)
Forgesu vian edzon!

EŬRIDICO

Nel!

DUA GARDISTO

Obeu!

(*LA UNUA GARDISTO penas per-
forte trinkigi ŝin.*)

UNUA GARDISTO

Ne amu plu!

EŬRIDICO

Orfeon mi ne neu!
(*Ŝi baraktas, kaj forkuras, sed faligas
sian floron!*)



DUA GARDISTO

Ŝi trinkos! Sed atentu, ĉar nun iu nova alvenas.

UNUA GARDISTO

Mi operaciul!

(ORFEO envenas, kurante, pleregante. Li portas nigran tunikon, sed helverda mantelo preskaŭ kovras ĝin.)

ORFEO

Leteo, ho Leteo! Ho, forgeso!
Forgesu mi pri ĉia malsukceso,
pri sopirado, amo senespera,
perdo, kaj propra morto plej mizera,
pri homoj kiuj min en sang' disŝiris,
pri ĉio kion iam mi deziris!
Ĉar ĉio estas tro! Ho Eŭridico!
(Pro la krio, EŪRIDICO revenas, sed heziteme.)

Mia malforto, stulto kaj kaprico
vidvigiĝis min denove. Nigra ondo,
min forgesigu pri l'angora mondo!

(La UNUA GARDISTO prezentas al ORFEO la pokalon. Li tuj trinkas avide: EŪRIDICO krias kaj etendas la brakojn al li; li redonas la pokalon; la mantelo forfalas kaj li restas nigre vestita)

EŪRIDICO

Orfeo! Oj, mi venis tro malfrue!
(Li tute ne, aŭdas ŝin!)

UNUA GARDISTO

Li daŭros nun sename kaj vakue.
(ORFEO fermas la okulojn, tremas, ŝanceliĝas, sed poste rektiĝas sin. Nun li estas perfekte kaj senvive trankvila.)

ORFEO

Subite mi vertiĝis en la spaco.
Nun venas vasta - - - infinita paco.
Ho ripoziga nigro!
(Li vidas la floron faligitan de EŪRIDICO, kaj prenas ĝin.)

ORFEO

- - - Kolorero!
Kio ĝi estas?

UNUA GARDISTO

Floro de la Tero.

ORFEO

Mi ne komprenas vin.

EŪRIDICO

Oj!

ORFEO

De la tero?
Mi ne komprenas.

EŪRIDICO

Plena senespero!

ORFEO

Ne gravas.
(EŪRIDICO alproksimiĝas kaj denove etendas la brakojn al li, sed li neniel reagas.)



EŪRIDICO

Mia edzo! Min rekonu!
(LA GARDISTOJ ridaĉas.)

ORFEO

Kio ĝi estas?

EŪRIDICO

Ho, mi trinkos! Donu!

UNUA GARDISTO

Finfine vi komprenas, kaj sagaca iĝas! Do, trinku! Estu plene paca!
(Li prezentas la pokalon. EŪRIDICO prenas ĝin, sed ŝia mano tiel tremas ke ŝi elverŝas kelkajn gutojn sur la floro en la mano de ORFEO. Ĝi nigriĝas. Li apatie faligas ĝin. EŪRIDICO kriegas kaj faligas la pokalon.)

EŪRIDICO

La floro - - - mi ĝin plukis en la lumo -
nigra - - - velkinta - - - morta sen
parfumo - - -

Ha, via paco kaj rezigna neo estas, la pac' de putro kaj pereol!
Ho lasta memorilo! Ho pocio damna, la fino de la emocio!
Mi ĝin rifuzas, kaj mi sekvos lin, serveme, nekonate, kun obstin' por ĉiam; mia kara min bezonos finfine, eble, se li min ne konos.
Li min ne amos plu; sed mi lin vidos; eble mi helpos lin, konsolos, gvidos iel; mi vagos en eterna tristo, sed mia amo estas la ekzisto por mi, kaj mi kolora kaj reala restos, eterne ama kaj lojala; mi amos lin laŭ eblo, en infero, Kiel mi amis sur la suna tero.
(ORFEO vagas sur la sceneio kun klinita kapo. La UNUA GARDISTO reprenas la pokalon, plenigas ĝin en la rivero (post la digo) kaj re-prezentas ĝin.)

UNUA GARDISTO

Virino! jen la akvo de forges!
Ĉu do vi volas vin torturi?

EŪRIDICO

Jes.

La nuna fato estas ja terura - senamaj, Vi ne scias! - ja tortura tamen, torturoj kun Orfeo pli plaĉas, ol paco kaj ripoz' sen li.
(La GARDISTOJ ridaĉas kaj residiĝas.)

ORFEO

Mi ne komprenas ion ajn. Mi venas ien, el ie - - - sed mi ne komprenas.
(EŪRIDICO sin metas antaŭ li, tiel kiel li ne povas ne vidi ŝin.)

EŪRIDICO

Dio al vi min sendis, por protekto.
(ORFEO longe kaj fikse rigardas ŝin. Li ne rekonas ŝin; sed li ekamas ŝin.)

ORFEO

Benata estu Di, pro la elekto!
(La metala rido de la GARDISTOJ tuj ĉesas.)
Benata estu Dio, kiu benas.
- Mi ĵus naskiĝis; kaj mi ne komprenas la novan vivon - - - tamen, jen signifo!
Ĉu mi vin serĉis - - - dum la tuta vivo?

EŪRIDICO

Jes.

ORFEO

Kaj post ia longa iluzio
Mi trovas vin?

EŪRIDICO

Jes.

ORFEO

Dankon do al Dio!
Vi restos, ĉu? Ne estas iluzia?

EŪRIDICO

Ne. Dum eterno mi restados via.

DUA GARDISTO

Ho abomena diro, aĉa vido!

UNUA GARDISTO

Malvenko! Ho obsceno, ho perfido!
(La GARDISTOJ sin ĵetas teren sur la digo kaj kovras sin per la nigraj manteloj. Ili similas al limakoj.)

EŬRIDICO

Venu. Ni plukos asfodelo-garbojn; rigardos la trankvilajn nigrajn arbojn; promenos en la kampoj de l' infero sen timo de disiĝo kaj sufero, ĉar morto jam okazis. Ĝi sufiĉas. Kunaj por ĉiam nun, ni ekfeliĉas finfine. Jen la nigra mortopovo nun mortas mem post ĝia lasta provo.

ORFEO

Mia perfekta, dolĉa kunulino,
Vi ŝajnas kvazaŭ bela halucino,
kiun mi ĉasis, kiu en realo
aperas nun, vivanta idealo.
Mirinda renkontiĝo! Estu danko
Al Dio! - Sed ĉu vi min amas, ankaŭ?

EŬRIDICO

Ekde l'unua vid' mi amis, kara.

ORFEO

Eltrovitino! Kara, senkompara!
Vivu la mortol ĉar, sen preĝo peta
Mi trovis vin; kaj tuj vi estis preta,
Kvazaŭ vi min atendus! Mia bela,
ĉu dum eterno estos vi fidela?

EŬRIDICO

Jes, en futuro kaj en pasinteco
Mi nunas nun kun vi, ho kara edzo.

KURTENO

NOTOJ

Mi esperas ke la legendo de Orfeo kaj Eŭridico estas parto de la mondkulturo. Tamen, eble mallonga klarigo memorigos iun pri la legendo. Orfeo kaj Eŭridico estis geedzoj kiuj tre amis unu la alian. Eŭridico mortis pro la mordo de serpento; sed Orfeo tiel amis ŝin ke li iris al Hadeso (la greka mondo de la mortintoj — ne necese loko de puno) por trovi ŝin.

Genia muzikisto, li tiel perfekte kaj kortuŝe ludis la liron ke la reĝo de Hadeso redonis la edzinon, nur sub la kondiĉo ke Orfeo devos ne rigardi ŝin ĝis ili estos sendube sur la Tero.

Ĉe la limo inter la tero kaj la subtera mondo, Orfeo, pelita per amo, rigardis Eŭridicon, kaj ŝi devis remorti.

Baldaŭ poste, kelkaj frenezaj aninoj de Bakho disŝiris Orfeon. Mi penas krei sekvaĵon kiu, same kiel la legendo, enhavas iom da morala signifo.

LETEO: Rivero en Hadeso. Ĝia akvo donis plenan forgeson pri la tera vivo.

STIKSO: Rivero en Hadeso. La mortinto devis transiri ĝin, en la boato de Ĥarono.

POCIO: Trinkebla medikamento. (Briquet: *Medicina Vortaro.*)

(La aŭtorino volas kapti la okazon publike danki al sia patrino, s-ino Evelyn Maud Boulton, kiu tajpis la kopiojn de la jena dramo perfekte, kaj kiu lernis tajpi nur por helpi sinofere al la filino.)

Libro, kiu vekis kaj ridigis la mondon

Post eldono japanlingva aperas en Peking "*La aventuroj de bona soldato Svejk*". la fama romano de ĉeĥo Jaroslav Hašek, en ĉina traduko. Kaj dum tiuj ĉi tagoj estas preparata nova nederlandlingva eldono de tiu libro, kiun povas jam plejparto de eŭropaj nacioj legi en sia lingvo.

Estos interese esplori, kie kuŝas sekreto de ĝia sukceso.


"Svejk" estas satiro, kiu senkompate malkovras la nekuraĉblajn vundojn de la malsana imperio Aŭstrio-Hungario, staranta ĉirkaŭ la unua mondmilito antaŭ sia finvelko, kaj kiu per plej naturalismaj koloroj pentras la tiaman vivon precipe en la aŭstria armeo, iranta al la milito. Jen temoj, ŝajne iom malproksimaj por la ekstera publiko. Precipe en la nuntempo, kiam Aŭstrio-Hungario apartenas al la historio, sed ankoraŭ tro freŝe, senlegende.

La verko tamen sin direktas al pli vastaj tavoloj sen diferenco de lando kaj tempo. Al neinformitoj kaj nekomprenantoj, starantaj flanke, ĝi malfermas la okulojn kaj instruas ilin rigardi la okazintaĵojn en ilia vera aspekto. La

grandaj amasoj tuŝitaj de la milito — tiama aŭ pli posta, — inter ili unualoke la batalintaj soldatoj, revidis en la figuroj de la romano sin mem kaj sian ĉirkaŭaĵon. La legantoj ekkomprenis la sensecon de la militoj, nemoralecon de ĉiu perforto kaj en iliaj koroj ekĝermis la decido, ke nek ili, nek iliaj infanoj partoprenu iam en tiu abomena ludo.

Tiel alte staras la vera celo de la libro, kiu laŭ unua aspekto estas nur humorplena romano. Tiun formon donis al ĝi la sperta satiristo Hašek, por ke ĝi kaptu sentojn kaj koron. Amuzante en plej alta grado, vekante nereteneblan ridon sur ĉiu paĝo, ĝi vivigas samtempe en la leganto konscion pri la vera interno de ĉiu normala homa estaĵo, kiu deziras nek morti, nek mortigi pro iu ajn "nobla" motivo. La aŭtoro observis malgaje, ke iuj ĝuis la romanon nur kiel amuzon kaj defendis la "veran Svejk-on" kontraŭ ili.

Nur la vivo mem povis krei figurojn tiel verajn, kiel aperas en tiu ĉi ĉefverko de Hašek. Impulson al priskribo de la iam sensaciaj aventuroj donis parte traviva-



Al la spriteco de *Svejk* multon aldonas la mondkonataj ilustraĵoj de ĉeĥa artisto Jozef Lada, laŭ kies afabla permeso ni reproduktas la supran bildon.

joj de la aŭtoro mem dum lia soldata deĵoro en la diversaj garnizonoj, aliaj roluloj de la romano estas soldatoj, kiujn li tie renkontis. Vivis, sed mortis antaŭ pluraj jaroj la oficiro Lukáš el "Švejk". Li portis la nomon Lukas. Lia servisto František Strašilipka, en sia civila vivo brikaristo el Hostivice (loko proksima al Praha), sprita, fortstatura homo, kutimanta paroli en komparoj, iĝis la titola heroo Švejk, kiu kun moka spito sciis rezisti la grandan militan maŝinon. Ekzistis, eĉ kun neŝanĝitaj nomoj, kapitano Sagner kaj serĝento Vaněk, pri kiuj ni legas en la romano, kaj multo el la okazintaĵoj tie priskribitaj vere okazis, kvankam la amplekso kaj evoluo de la incidentoj restis ofte en pli modestaj limoj. Ĉiun kaj ĉion sciis meti Hašek en serenan kadron de sia senmorta humoro, dramaj problemoj solviĝas en

"Švejk" kutime en pleja facilo kaj kun sekvoj entute maltragediaj.

La romano "Švejk", kies ĉefaj scenantoj estas ĉeĥaj soldatoj, estis plej proksima al ĉeĥaj legantoj, sed ĝi fariĝis rapide proprajo de ĉiuj nacioj. Ĉiu el ili trovis en la libro respegulon de io al li konata, sed antaŭe ne tiel klare konceptita. Tial ĝi enpenetris tiel profunde, eĉ se ni konsentas, ke unua instigo al lego estis la humoreplena prezento. Kaj — strange — ĝi estas legata ĉiam kun sama intereso kaj streĉo, kiel en tago de ĝia apero, post la unua mondmilito. Sendube pro tio, ĉar la veroj en ĝi proklamataj havas ĉiaman validon. La freŝa nederlanda libro, la nun aperantaj eldonoj ĉina, japana, hebrea kaj ĉiuj sekvantaj tradukoj estos verŝajne glutataj kun sama entuziasmo, kun kiu akceptis la unuajn kajerojn de "Švejk" la ĉeĥaj legantoj en la jaro 1921. Sume ekzistas "Švejk" en proksimume 28 lingvoj. Preciza konstato ne estas nun ebla pro dummilita perdo de koncernaj dokumentoj. Parto de la romano aperis ankaŭ en Esperanto. Hašek, kiu mortis en 1923 en sia kvardeka jaro, verkis krom "Švejk" ankoraŭ pli ol 1000 rakontojn, kiuj pruvas liajn talentojn kaj spriton.

Milionoj en la tuta mondo legis la romanon kaj inter ili troviĝis kompreneble ankaŭ kondamnantoj. Oni nomis nemorala priskribi vivon de soldatoj, kiuj ja vere ne kutimas interparoli salonmaniere kaj ne intertraktas en gantoj. Eventualan troigon senkulpigu la kritikantoj, metante antaŭ siajn okulojn la veran celon de la romano: Eduki la homojn, ke ili malamu la perforton.

Ota Ginz

J. Ribillard

Vagado sub palmoj (6)

Sbah

Bonan Apetiton

En tiu mateno, kiam Moseo haltigis la hebreaŭ hordon por la ĉiutaga lunĉo, li dolore konstatis, ke la korboj enhavas nur sablerojn kaj kelkajn krus-taĵojn, tiel malmolajn, ke sur ilin malsategaj kadukulinoj rompus siajn lastajn dentojn. Mizeroo... Kaj ne eĉ la plej eta butikisto ĝis la vidlimo.

Sed Jahveo inter du nuboj el blanka muslino, akompanadis la elektitan genton per patreca rigardo. Baldaŭ Li ĝin aŭdis frapanta siajn malplenajn pelvetojn per neutilaj forkoj, kaj ritme kantanta, laŭ la fama ario: „La lampionoj estas la okuloj de la noktangeloj”.

— La supono!... la supono!... la supono!...

Kreskis la tumulto, jam pluraj grumbluloj minacis Moseon per siaj gameloj, tiam de la altnubaro defalis tiu mirakla nutraĵo, kiun ĉiu ĝissate glutis. La ĉiela manaŝo savis la Patron de Izraelo, kaj kun li mian borsan agenton.

Nu, ankaŭ mi manĝis manaŝon.

Ŝprucante el la senlima plataĵo, la oazeto de Sbah aperas kvazaŭ masivo de plumbbalailoj meze

de futbalareno. La vento karese ludas tra la palmoj kaj subtile surŝutas la daktilflorojn per blonda sablo. El malmultaj putoj la loĝantoj ĉerpas akvon iomete salamaran, kiu kuras en kanaletoj kaj irigacas malvastajn terpecojn kultureblajn. Tie kreskas hordeo, milio, maizo, fabo, lento... kaj ankaŭ kanabo, kies elsekigitajn foliojn oni fumas en pipetoj. Kompatema herbo, helpema narkotiko, kiu trompas malsaton, sonĝe transportas la indiĝenojn en la Paradizon de Allah, kaj al mi okazigas malmalsanon.

Ĉiu zorgeme prilaboras sian ĝardenon kaj jaluze antaŭgardas siajn kreskaĵojn kontraŭ sekeco, insektoj aŭ malutilaj bestoj. Ĉar unu nesufiĉa rikolto neprigas malsategon, ruinon kaj mizeron. Katastrofa danĝero plej ofte minacas la nordafrikan vegetaĵaron: invado de akridoj, tiuj glutemaj bestoj, kiu formanĝas ĉion, kio kreskas: foliojn, legomojn, herbojn, eĉ pajlon kaj stoplojn, kaj forlasas sian restoracion nur post kompleta dezertigado.

Ili naskiĝas en la sudo ie, ĉirkaŭ la lago Ĉad.



Ĉe iu bela mateno, kvieta kaj roza kiel virgulino, al la nordo ekflugas la nenombrebla armeo, kaj kun zumbruo de ĉifita fajro portas la morton en siaj teruraj makzeloj. La traĵado de Saharo ilin ne malkuraĝigas, nenia baro ilin haltigas, nenio malhelpas trafi la allogajn herbejojn de la riĉaj marbordoj. Oni eĉ vidis plurajn batalionojn transflugi Mediteraneon kaj festeni per niaj melonoj kaj olivoj de Provenco. Mi kredas, ke tiuj senhontaj ortopteroj, altirataj de la pariza vivado — Ho, *Paris by night* — deziris ĝui la lastan teatraĵon de Sacha Guitry, aŭ frandi verdaĵon en la Schwartz kabareto.

La grizflava flugantaro nebuligas la ĉielon, maskas la sunon, disvastigas sian timindan ombbron sur la malfeliĉajn popolojn. Ĉe la vido de tiuj sovaĝaj invadantoj febre agitiĝas la vilaĝanoj, kiuj sin pretigas por defendi siajn bienojn. Vi certe konas la uzatan rimedon. Ne?... Nu, jen:



Ekde la alteriĝo de la antaŭgvardio, virinoj kaj infanoj rapideme eliras el siaj kajutoj, energie frapante kaldronojn, kuirpotojn, kaserolojn, per fortaj batoj de palmobranĉoj, kaj supersutante la vizitantojn per akraj krioj aŭ ofendaj insultoj. Komprenible, la akridoj tiel malĝentile akceptataj forlasas ĉi tiun malgastigeman ĝardenon, kaj sin jetas sur la najbaran. Ho ve! ankaŭ tie senkompata familia ilin forpelas sur la proksiman kampojn, kie aliaj persekutantoj ilin sammalamike traktas. Bonvolu noti, ke nur virinoj kaj infanoj partoprenas tiun krue'lan ĉason. La viroj, kaŭrante ĉe la sojlo de la dometoj, direktas la movojn, promesante la bastonon al la nefervoraj batalistoj.

La martirigado daŭras ĝis kiam la noktiĝo dro-nigas la spiteman oazeton en siaj malvaj vualoj, sub la malvarma lumo de la unuaj steloj. Finfine, forpuŝite de ĝardeno al alia, stultigite pro tiom da bruoj kaj krioj venkita pro tiom da senhumaneco, kun malplena stomako, malgaje tranoktas sur la dezerta tero la fisenĝenaj vojaĝantoj.

Estas tie, ekstere de la nedifektita palmaro, ke la sekvantan matenon oni retrovas niajn barbarojn malviglajn pro senkomforta ripozo. Ĉar vi scias, ke tiuj insektoj povas ekflugi nur kiam la sunradioj revarmigis iliajn rigidajn membrojn. Ĉe la palega antaŭtagiĝo la fruelliĝaj sbahaninoj ekvidas la lacepelitan armeon surtere dormema kaj prisonĝanta la grasajn legomĝardenojn de Alĝerio. Tuj ili kontraŭatakas. Ili kolektas kaj en grandajn sakojn rapide enŝovas la senmovajn kaj sendanĝerajn entrudulojn. Post unu horo ili hejmen kunportas dikan ŝarĝon da freŝa viando, kiu ornamas menuon kutime sen surprizo.

"Post fasto venas festo", dirus mia kamelisto.

Jam la unuaj sunradioj spronas la elsaviĝintojn de la morta rikolto. Tiuj peze ekflugas, dum la kaptitoj provizas la familiajn manĝokonservejojn. Frititaj en bolanta oleo la malbonsancaj viktimoj elfinas sian aventureman ekziston sur la tablo de la delikatuloj.

Promenante tra la vilaĝa vendejeto post abunda migrado de la pasloĝantoj, mi aĉetis unu frankon

da tiuj sovaĝbestoj, kiujn mi gustumis tute krake-
tantajn. Tio estas manĝebla... eble iom seka...
bezonas spicon... he, ĉi tiu estas sufiĉe bongusta...
tamen, tiuj muskoplenaj kruroj... kiel?... kun mus-
tardo?... jes, vi sendube pravas... ha, tiu bela
specimeno estas plaĉe mola... Fatmah, ankoraŭ por
unu franko...

Evidente, mi konfesas, ke tiu manĝaĵo ne per-
fekte indas reĝan tablon, des pli ke tiuj flugantaj

pilgrimantoj, post longa vojaĝo super senkreska
dezerto estas tro malgrasaj. Kial ilin ne grasigi
anstataŭ vendi tiujn skeletojn? Mi ja preferus ilin
lardokovritaj kaj per aromoj farĉitaj. Jen kio
vekus apetiton.

Sed ŝajnas, ke "vera" manao, laŭ la juda modo,
devas esti KRUDE manĝata. Mi ĉi tie ne dis-
kutos pri gustoj aŭ koloroj, vi mem elektos post
sincera provado.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

la 1-an de decembro 1955

N-ro 278

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de novembro
kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de novembro 1954:

| | 1954 | 1955 |
|---------------------|--------------|--------------|
| Asociaj membroj | 9373 | 11554 |
| Individuaj membroj: | | |
| MJ | 1008 | 981 |
| MA | 3935 | 3991 |
| MS | 736 | 829 |
| Pat. | 7 | 9 |
| DM | 277 | 295 |
| HM | 59 | 58 |
| | <u>6022</u> | <u>6163</u> |
| | <u>15395</u> | <u>17717</u> |

NOVAJ ĈEFDELEGITOJ:

Sud-Afriko

Woodruff, S-ro Edward W., kolegia
prelegisto, c/o Witwatersrand Tech-
nical College, P.O. Box 3293, JO-
HANNESBURG. Tel. 23-1141.

Usono

Parrish, S-ro Donald E., kontisto, 328
W. 46 str., LOS ANGELES 37, Cal-
ifornia. Tel. AD 41233

DELEGITOJ:

Aŭstralio

Brisbane. VD: S-ino Violet Fraser, dom-
mastrino, 31 Bayview Terrace, Clay-
field N 14. Tel. M 3387.

Belgujo

Bruxelles 3. VD: S-ro Victor Lamberts,
inspektoro, 62 Avenue Ernest Renan.

Brazilo

Americana. (Est. São Paulo). D: S-ro
Nerino Della Rosa, Rua Carioba 827.
Tel. 1342 (oficejo).

Caratinga (Minas Gerais). D: S-ro W.
R. Oliveira Leal, Avenida Olegario
Maciel 206.

Jaŭ (Sao Paulo). D: D-ro I. Peccioli,

kuracisto, Mal. Bittencourt 500, Tel.:
553.

Maceió (Alagoas). VD: S-ro Nid Amo-
rim, civila inĝeniero, Praça Manoel
Duarte 145, Pajussara.

Resplendor (Minas Gerais). D: S-ro Svl-
vio Nunes Leal, advokato, Rua Ole-
gário Maciel 1284, Caixa Postal 81.

Santo André (São Paulo). D: S-ro José
Dias Pinto, industriisto, Caixa Postal
no. 834. Tel.: 367 - S. Caet. do Sul.

São Caetano do Sul (São Paulo). D:
vakas.

São José do Rio Preto (São Paulo). D:
S-ro L. A. Bartholomeu, komercisto,
Rua 15 de Novembro 3356. Tel: 2383.
FD (Filatelo): la D.

Britujo

Kingston-on-Thames (Surrey). D: vakas.

New Barnet (Herts.) D: vakas.

Richmond (Surrey). D: S-ro A. J. L.
Hughes, eks-oficiro armea, 33 Rich-
mond Hill Court. Tel.: Ric 2971.

FD (Sporto: nur jahtistaj aferoj): la D.

Ĉeĥoslovakujo

Hradec Králové (Hradecký kraj.) FD
(lingvoj): S-ro Miloš Lukáš, profesoro,
Bezručova ulice 853.

Praha XX. FD (Filatelo): S-ro Harry
H. Khel, Pivonková 2124.

Danlando

Aalborg (Jylland). D: S-ino Ketty
Hvidbjerg, dommastrino, Vestre Alle
101. Tel.: 12871.

Finnlando

Alavus (Vaasan lääni). D: S-ro Jalo
Norja, instruisto, Korpinen.

Imatranskoski (Kymen lääni). D: S-ro
J. Torkkeli, terkulturisto, Ahola. Tel.:
Ahola 10.

Korso. D: Vakas.

Nokia (Hämeen lääni). D: S-ro Pentti
J. Anttola, metalturnisto, Iltarusko A 2,
Linnavuori.

Tainionkoski. D: S-ino Alli Ripatti, Ase-
mäki.

Turku (Turun ja Porinl.) FD (Arto:
muziko): la D.

FD (komerco): S-ro Matti Juutlainen,
direktoro, Kanslerintie 6 B 45, Tel.:
17094.

Tyrvää. Vidu Vammala.

Francojo

Avignon (Vaucluse). D: S-ro Roger
Motto, fervojisto, Rond-Point de la
Gare.

FD (fervojoj): la D.

Charleville (Ardennes). D: S-ro Michel
Pierquin, komercisto, 24, rue Bourbon.
Tel. 24-09.

Paris. VD: S-ro Gaston Fournier, oficisto,
37 rue Palestro, Paris 2.

VD: S-ro Jean Thierry, 26 rue Mo-
lière, Paris 1. Tel. Ric-91-08.

Reims (Marne). VD: vakas.

Rueil-Malmaison (Seine-et-Oise). D:
S-ro René Watier, inĝeniero, 27, rue
du Château. Tel. Mal 01-25.

Thiers (Puy-de-Dôme). FD (Abelkul-
turo): la D.

Germanujo

Dortmund (Nordrhein/Westfalen). FD
(stenografio): S-ro H. Rosenträger,
fakinstruisto pri stenografio, Kasta-
nienplatz 26, Dortmund-Wambel. Tel.
30141.

Lübeck (Schleswig-Holstein). D: S-ro
Fr. Bruns, fervoja oficisto, Sachsen-
weg 2.

FD (Fervojoj): la D.

Rendsburg (Schleswig-Holstein). D:
S-ino A. Bepperling-Wolff, Neuwer-
ker Gärten, Pommernweg 18.

FD: (bestproduktado: kunikloj): la D.

Irlando

Loughrea (Co. Galway). D: S-ro S. O. Conaire, instruisto, Ryan's Hotel, Main Street.

Italujo

Borgo a Buggiano (Pistoia). D: S-ro A. Michelotti, instruisto, Via Prov. Lucchese 44.

Como (Como). VD: S-ro C. Catelli, kombistino, Via A. Volta 35.

Jugoslavio

Celje (Slovenija). FD (metiistaj aferoj): S-ro Ivan Jazbec, remburo, Cesta na grad 41.

FD (oficistaj aferoj): S-ro Franc Klec, oficisto, Olo. Tel.: 2606.

Dubrovnik (Hrvatska). FD (edukado): S-ro Dinko Matković, instruisto, Vicina 6.

Kaštel-Gomilica (Dalmacija). D: S-ro Hans Rožič, hejtisto en industrio, Radničko Naselje 4 (Kod Splita).

Sarajevo. D: S-ro Petar Jovović, metiisto, Ilije Grbić 8.

Split (Dalmacija). VD: S-ro Joško Karničić, teknikisto, Vladimira Nazora 18/II.

FD (Ekonomio): la D.
FD (Tekniko): la VD.

Zemun (NR Srbija). FD (Fajrobrigadaj aferoj): S-ro J. Römer, tekn. sekr. fajrobrigado, Ves Masleša ul. 10/1. Tel.: 37-602.

Zrenjanin (A.P. Vojvodina). D: S-ro B. Božidar, oficisto, ulica broj 10. Tel.: 21-45.

Norvegujo

Greaker (Østfold). D: S-ro S. Birch Olsen, komercisto, Greåkervn. 124. Tel.: Sarpsborg 61199. FD (Komerco): la D.

Horten (Vestfold). D: S-ro S. Boneid, ŝtatoficistino, Solliegaten 10. Tel.: 1229. VD: vakas.

Svedujo

Borås (Västergötland). FD (Arto): S-ro Henning Nilsson, pentristo, Vindegat. 11 c.

Höganäs (Skåne). FD (konstruado): S-ro A. Persson, konstruisto, Lerbergsvägen 1016. Tel. 666.

Linköping (Östergötland). FD (Tekniko: elektra): S-ro Holger Hennings, Åbylundsgatan 43. Tel. 40720. FD (Konstruado): S-ro E. Grönlund, domlignajisto, Ryddalsgatan 6 D.

Usono

Auburn (Washington). D: S-ro S. C. Ballard, ekskontisto, 215 Third Str. N.E. (P.O. Box 348). Tel.: Temple 3-2188.

Bell Gardens (California). D: S-ro H. D. Agnar, maŝinisto, 6519 Specht Ave. Tel. LU 13044.

Burbank (California). FD (Tekniko:

aerodinamiko): D-ro Edmund Bartsch, inĝeniero, 403 N. Ontario Street. Tel.: TH-29825.

Downey (California). D: S-ro Ch. E. Peterson, dom-makleristo, 8314 E. Florence Ave. Tel.: LU 1-9872. FD (komerco: domvendado): la D.

El Cajon (California). D: S-ro E. Ch. Pollock, muzikisto, 2222 Crest Dr. FD (Arto: trombonmuziko): la D.

Franklin Square (N.Y.) D: S-ro Michael Weber, 183 New Hyde Park Road.

Hackensack (Minnesota). D: S-ro Bruce L. Hanson, instruisto, Hackensack. Tel.: 4-F-3.

Lafayette (Indiana). D: D-ro F. J. Belinfante, universitata profesoro, 1809 Ravinia Road, West-Lafayette. Tel.: 35568.

Lakewood 11 (California): D: S-ro R. C. Betteridge, ekstelegrafisto, 5746 Rocket St. Tel.: T.O. 66168.

Lillie RFD 2 (Louisiana). D: S-ro James D. Sayers, verkisto, R.D. 2 Lillie.La.

Little Rock (Arkansas). D: S-ro G. Igers, profesoro, 1118 Izard Str. Tel.Fr. 4-0434.

Long Beach 7 (California). FD (Juro): S-ro William O. Wanzer, Advokato, 3738 Gaviota Ave. Tel.: GA 46650.

Long Beach (California): D: S-ro Bill Harmon, ĉefkomizo, 500 Enloe Bldg., 115 Pine Ave. Tel.: HE 74191. FD (fervojoj): la D.

Los Angeles (California). FD (Edukado): S-ro Minnie Porter, instruistino, 3214 Silverado Drive. Tel. 1-6650

Meadville (Penna.) D: S-ro Conrad Fisher, laboristo, R.F.D. 1.

Middleton (Wisconsin). D: S-ro Gl. P. Turner, leĝisto, Middleton. Tel.: Ceader 3: 2468.

Minneapolis 2 (Minnesota). D: D-ro L. Wendell, dentisto, 1001 Medical Arts Building. Tel.: 5035.

Newton Centre (Massachusetts). D: F-ro Roan U. Orloff, oficistino, 31 Nahanton Str. Tel. DE 2-5137. FD (Religio: Bahaismo): la D.

Orlovista (via Orlando, Florida). D: S-ro Robert Blackstone, privata agento, Box 217. Tel.: 3-9169.

Pacific Palisades (California). FD (Statistiko): S-ro Thomas Goldman, ekonomiaŭto, 719 Chapala Drive. Tel.: Exbrook 58863.

Philadelphia 16 (Pennsylvania). D: S-ro Edward W. Pharo Jr., Elek. inĝeniero, „NLIR”, 220 County Line Road. Tel.: OR 3-3927. FD (tekniko): la D.

Power (W.Va.) D: S-ro Stephen A. Sinnick, pastro, P.O. Box „A”.

Richmond 8 (California). D: S-ro H. R. Dreyer, oficisto, 6000 Huntington Ave., Tel.: LA 6-3563.

San Diego (California). D: S-ro Dirk Brink, bankoficisto, 3418 Marlborough Str. Tel. AT 4-2058. VD: S-ro Francis E. Helmuth, dom-

konstruisto, 2354 Palermo Drive. Tel.: AC 2-9176.

FD (Arto: amatora teatro): S-ro Wm. D. Brown, stenografiisto, 4085-40th Street. Tel.: AT 1-9213.

San Francisco (California). D: S-ro Jo Van Zwol, inĝeniero, 346 Staples Ave., Tel.: 7-4197.

Seattle 3 (Washington). D: S-ro Ferd. Carlson, bussoforo, 2116 North 35 Str. Tel.: Melrose 2181.

Silview (Delaware). D: S-ro Gilbert Nickel, kolegia profesoro, 204 Harding Avenue. Tel.: Weyman 4-6289.

Spokane (Washington). D: S-ro H. Verploeg, ŝuriparisto, 1908 E 8 Ave., Tel.: Keystone 9057.

Tacoma (Washington). D: S-ro David B. Richardson, televidisto, 3412 No. Mullen Str. Tel.: PR 4729. FD (Tekniko-radiotelevido): la D.

Trenton 8 (New Jersey). VD: S-ro Howard G. Borden, ŝtatoficisto, 110, So. Overbrook Ave. Tel.: EX 2-2842.

Van Nuys (California). D: S-ro R. C. Marble, pensiito, P.O. Box 2081. Di. 3-1187.

Waterman (Pennsylvania). D: S-ro Louis Obreczian, karbministo, Box 51.

NOVAJ KOMITATANOJ:

Bugajski, S-ro Edward, Zombkowska 38, Warszawa, Pollando.

Dratwer, S-ro Isaj, Skrytka 108, Warszawa, Pollando.

Rajski, S-ro Andrzej, Odyńca 3, Warszawa, Pollando.

EKSIGINTA KOMITATANO:

Durrant, S-ro E.D., 15 Beaufort Road, Reigate, Surrey, Britujo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ:

Nelson, s-ro C., Dordrecht, Nederlando.
Anderson, s-ro G., Linköping, Svedujo.
Akerö, s-ro E., Oslo, Norvegujo.
Schmidt, s-ro Louisa, New York, Usono.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1955:

822. Vila Verde, s-ro Edmundo, Rio de Janeiro, Brazilo.
823. Okubo, f-ro Mirtes, Pindamonhangaba, Brazilo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1956:

31. Nikolajević, S-ro Ante, Beograd, Jugoslavio.
32. Amelin-Sild, S-ro Helene, Port Arthur, Kanado.
33. Bengtsson, S-ro Erik, Hälsingborg, Svedujo.
34. Johansson, S-ro Bernt, Hälsingborg, Svedujo.
35. Lundgren, S-ro A., Hälsingborg, Svedujo.
36. Mollestad, S-ro S., Kramfors, Svedujo.
37. Edler, S-ro Per, Lund, Svedujo.
38. Garcia, S-ro Felix, Caracas, Venezuelo.
39. Maddern, s-ro Ivan, Woodonga, Aŭstralio.

40. Boatman, s-ro Douglas P., West-cliff-on-Sea, Britujo.
41. Dunbar, s-ro Robert, Camberwell, London, Britujo.

PATRONO 1956

Gueritte, s-ro T. J., Surbiton, Britujo.

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso:

R. Barta 4s 7p; H. Pilling 5s 6p; Esp. Klubo de Washington £ 2; H. H. Kür-

steiner 7s 8p; St. A. Sinnick 7s 6p; I. Maddern 2s; J. S. Finch £ 1.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo: Esp. Klubo de Washington £ 2.

Plej koran dankon al ĉiuj donacintoj. La Movado staras antaŭ unu el la plej gravaj epokoj de sia historio. Ĝiaj klopodoj meritas la materian helpon de ĉiu esperantisto. Ke ĉiu malavare subtenu ĝin.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horosistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

| | | |
|----------|-------------|---|
| Dimanĉo | 14.00-14.15 | Piraĉununga. 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (São Paulo), Brazilo. |
| | 23.00-23.30 | Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo. |
| Lundo | 12.30-13.00 | La Coruña. 250m P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo. |
| | 22.40-22.57 | Hilversum. 298m, 188m, P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato). |
| Mardo | 00.45-01.00 | San José. 192m P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo. |
| | 11.55-12.00 | Bern. 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern. |
| | 14.50-15.00 | Ljubljana. 327m, 211m, K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo. |
| | 17.35-17.40 | Bern. 48.66m, 31.46m, 16.87m. P. D-ro Baur. |
| | 19.00-19.15 | Stockholm. 42m, 25.63m. P. Radio IB.R.A., Esperanto programo, Poŝtako 822, Stockholm I, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato). |
| Merkredo | 19.15-19.30 | Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo. |
| | 15.30-15.40 | Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m. P. |
| | 16.00-16.10 | Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo. |
| | 17.55-18.10 | Roma. 50.34m, 41.15 m, 30.90m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo. |
| | 21.55-22.05 | Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo. |
| Ĵaŭdo | 22.15-22.20 | Hilversum. 402m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando. |
| | 06.45-06.50 | Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo. |
| | 08.30-08.45 | Paris. 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo. |
| | 11.55-12.00 | Bern. Kiel marde P. D-ro Privat. |
| | 17.35-17.40 | Bern. Kiel marde P. D-ro Privat. |
| Vendredo | 22.30-23.00 | Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo. |
| | 22.45-23.00 | Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo. |
| | 00.45-01.00 | San José. Kiel marde. |
| | 17.55-18.10 | Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella. |
| | 19.15-19.30 | Carlet. Kiel marde. |
| Sabato | 21.30-21.45 | Guatemala Cd. 370m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala, Mez-Ameriko. |
| | 11.15-11.30 | Rio de Janeiro. 214m. K. Rádio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo. |
| | 17.30-18.00 | Rio de Janeiro. 375m, 30.70m, 25.10m, 16.80m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo. |
| | 18.45-19.00 | Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo. |
| | 22.15-22.22 | Hilversum. 298m, 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando. |

Radio Roma. 4.I. Mondo Esperantista; 6.I. Epifanio; 11.I. Novaĵoj el Italujo; 13.I. Leterkesto kaj bibliografio; 18.I. Nia gazeto; 20.I. Promonado tra Napolo; 25.I. Sicilio, insulo de printempo; 27.I. Mozart en Italujo.

GRAVA ATENTIGO.

La kotizo-MS por 1956 estas altigita de 25 s. al 30 s. aŭ 15 ned. gld. Por Svedujo ĝi estas fiksita je 25 sv.kr. kaj ne je 22 sv.kr., kiel estas erare indikita en la Jarlibro 1955 dua parto.

Senĉese ni ricevas pruvojn, ke la Movado en Orient-Eŭropo reviviĝas. La tieaj samideanoj arde deziras kontakton kun la cetera mondo. Tial ni volonte instigas niajn membrojn, adopti fidelulojn en nepagipovaj landoj kaj membriĝi ilin.

De nun ni uzos ne plu la britan sistemon. Tamen, el la landoj de la brita imperio oni povas kiel kutime sendadi al ni ankaŭ en Nederlando britajn poŝtmandatojn, ĉar U.E.A. konservas konton en Londono. Post enskribado en niaj libroj ni prizorgos de tie ĉi la enkasigon.

Ni nun kalkulos en nederlandaj guldenoj, sed ni tre rekomendas al niaj konthavantoj uzi prefere en nia internacia movado la jam bonege funkciantan internacian monsystemon de *steloj*. Ĉi tie sekvas la kurzo de la stelo por la diversaj landoj:

Unu stelo estas en: Aŭstralio 7½ pencoj; Aŭstrio 2 ŝil.; Belujo 4 h.fr.; Britujo 6 pencoj; Danlando 0.50 d.kr.; Finnlando 2 f.m.; Francujo 25 fr.fr.; Germanujo 0.30 g.m.; Hispanujo 3 pes.; Irlando 6 pencoj; Italujo 42 liroj; Jugoslavio 20 dinaroj; Kanado 0.07 dol., Kanariaj Insuloj 3 pes.; Luksemburgo 4 l.fr.; Maroko 25 fr.fr.; Nederlando 0.25 gld.; Nigero 6 pencoj; Norvegujo 0.50 n.kr.; Nov-Zelando 6 pencoj; Portugalujo 2 esk.; Sud-Afriko 6 pencoj; Svedujo 0.35 sv.kr.; Svislando 0.30 sv.fr.; Urugvajo 0.20 pes.; Usono 0.07 dol.

La kotizoj, publikigitaj sur paĝo 8 de la Jarlibro 1955, dua parto, validas ankaŭ por 1956.

M. H. Vermaas,
Administranto

ANONCETOJ

Kaj oni venos el oriento kaj el okcidento, kaj el nordo kaj el sudo, kaj sidiĝos en la regno de Dio. S-ta Luko 13.29

Civilizacio estas rimedo de la homoj por korekti la erarojn de Dio. — Cohen.

Adventistoj en la tuta mondo! Mi serĉas kontakton kun gefratoj. Skribu al G. Kovács, Kispest, Jahn F.u.241, Hungario.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14s 6p por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four”, 1 Warrington Crescent, LONDON, W. 9, Anglujo. Telefono CUNningham 4487.

Turista Servo por Benelukso. Petu turistan kilometran karton, prospektojn, informojn al Robert Loeckx, FD UEA, Ministeria Gvidisto Turista, Konijnenperken 109, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo, kontraŭ sendo de pm. aŭ RK. Tel. 723222.

Koresponda Servo Mondskala havigas korespondantojn el multaj landoj. Petu ilin, indikante vian aĝon kaj aldonante respondokuponon, de: Daniel Luez, Boulevard Brossolette, LAON, (Aisne) Francujo.

Cu vi serĉas Esperanto-libron elĉerpitan? Petu mian katalogon! Skribu al H. Veenstra, librovendisto, J. M. Kemperstraat 28, AMSTERDAM-W. Nederlando.

Bezوناتaj flegistinoj por mensmalsanulejo, bone edukitaj, aĝo 18-32 jaroj. Por informoj skribu al: Medical Superintendent, Prestwich Hospital, Prestwich, MANCHESTER, Britujo.

Pluraj gekursanoj deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Inter ili estas geinstruistoj, gelernantoj gestudentoj kaj div. prof., kiuj dezirus interŝanĝi P.K. kaj koresp. Anonco valida ĝis fino jan. 1956. Bonvolu skribi al: „Esperanto-Kurso”, Nova Crnja Banat., Jugoslavio.

Pluraj gekursanoj deziras interŝ. P.K. kaj koresp. kun gesamideanoj en la tuta mondo. Anonco valida ĝis fino jan. 1956. Bonvolu skribi al ĉerkursgvidanto s-no Lehotkay K. Ferenc, Zrenjanin Banat, Jugoslavio.

Deziras interŝanĝi P.K.I. kaj L. kun ĉiuj landoj F.ino Iná Beleza, Rua Dores de Indaiá, 15, BELO HORIZONTE, Minas Gerais, Brazilo.

Jam aperis: Unua Broŝuro de „SOCIA FILOZOFIO”, prezo 3 respondkuponoj. Mendu pere de UEA.

Filatelistoj! Deziras interŝanĝi pm. kaj unuĉi-kovertetojn tutmonde Zygmunt Kusmider, Pabianice 1, Piekna 5, Pollando.

Kvardek gekursanoj 14 ĝis 40-jaraj deziras korespondadi kun la tuta mondo. Respondo garantiita. Bonvolu skribi multnombre al kursgvidanto Dowejko Piotr,

Dokp. Wydz. Zaopator., Matr pokój 364, GDANSK, ul. Dyrekcyjna 2-4.

Por siaj progresintaj gelernantoj petas korespondantojn Pastro Hugo Montedônio, ITABORAI, RJ, Brazilo.

Por lernantoj en Tut-Rodezio Esperanto-Societo ni serĉas korespondemajn gejunulojn (speciale inojn). Adresu viajn leterojn al: L. Heilberg, Poste Restante, KITWE, Norda Rodezio.

Mi serĉas gekunlaborantojn por fari praktikan permanan servadon, dum feria periodo kaj eble kiel grupo Esperantista. Estos senprofite kaj ĉiu respondecos almenaŭ pri la propra vojaĝkosto. Thomas J. Woodall, per I.V.S.P. 19 Pembriidge Villas, London W. 11, Britujo.

Letervesperon aranĝas la Esperanto-Societo de Milwaukee je la 12-a de Januaro 1956. Dudeknaŭ membroj, havantaj variajn gradojn de Esperanta lerto, deziras korespondantojn pri diversaj subjektoj. Tiel ke ni povu ĝui grandan letervesperon, sendu leterojn, ilustritajn poŝtkartojn ktp. Nepre respondos. Adresu: S-ro Jarvis E. Bush, Prz. Esperanto Societo de Milwaukee, 3700 North 75th Street, Milwaukee 16, Wisconsin, Usono.

Por entuziasmigi gelernantojn bonvolu sendi pk. k. ekspoziciajn materialejn al IPIRANGA ESPERANTO GRUPO, Rua Agosinho Gomes 2572, Sao Paulo, Brazilo. Respondo garantiita.

Studanto de lingvoj volas korespondi kun francoj, hispanoj, italoj, germanoj. Ankaŭ Esperante. David Jenkins, Apt. 62, 76 Eglinton Avenue East. TORONTO, Canada.

ORA JUBILEO Sheffield Esperanto Societo. Alilandaj geamikoj, bonvolu sendi poŝtkartajn gratulojn antaŭ februaro al: 18 Mona Avenue, Crookes, Sheffield, Britujo.

Interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj Josef Jerubaal P.O.B. 7015, Jerusalem, Izraelo.

Vivŝin-kamerado serĉata inter 65-75 j. instruita, ĝentila, bonhumora, kiu jesas la internan sencon

de Esperanto kaj deziras vivi en Esperantujo ne nur dum kongreso. Bonvolu skribi al S.ino Vojaĝemulo, Marbourg (Lahn) Renthof 9, Germanujo.

Gimnaziano 15-jara deziras korespondi kun anglino, poste interŝanĝi vizitojn. Bonvolu skribi al Gisela Pfannenstiel Marburg (Lahn), Rotenberg 1 a, Germanujo.

Germanino, komencantino, sed jam mezaĝa, deziras korespondi kun Svedino. Bonvolu skribi al S.ino Fromm, Marburg (Lahn) Bismarck Str. 26, Germanujo.

Lektoro en universitato deziras korespondi pri sociaj kaj kulturaj temoj kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj diversajn librojn kaj ĵurnalojn. Vasil Čočov, St. N. Vofarĝiev 38, SOFIA 6, Bulgarujo.

Por ekspozicioj materialon, por legado gazetnumerojn ktp. petas „PACO” Esperanto-Rondo, BUDAPEST, V. Kulturhejmo, Engelstér, HUNGARLANDO.

Deziras interŝanĝi pm. el Skandinavio, Izraelo, Burmao, Indio, Pakistano kontraŭ Nederlandaj kaj antaŭaj koloniaj, surbaze de Yvert 1956, J. Ofman, J.K. Cardinaelstraat 19, Zaandam, Nederlando.

Usona verkisto, 27-jara, sincere deziras korespondi svatiĝe kun fraŭlino kaj vidvinoj 19-35-jaraj. Esperanto-parolantaj kaj Baha'ianoj, en Eŭropo, Nord- kaj Sudameriko, Azio, Afriko kaj l'mondo tuta. La virino taŭga devas havi inteligentecon, belecon kaj klerecon, sed ŝia nacieco aŭ raso estas malgravaj. Sendu, mi petas, fotografajon kaj aŭtobiografian leteron al: Eduĉjo Lacy, P.O. Box 805, HOUSTON 1, Texas, Usono. Ne poŝtkartoj. Je ĉiuj korespondantinoj mi respondos.

28-jara lernanto deziras korespondi tutmonde: Francisco Caballer, Calle Livia 12, PEDRALBA (Valencia), Hispanujo.

„Gelernantoj en daŭriga kurso deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Adreso: Karl Ahl, Tallgatan 4 a, Hälsingborg, Svedujo.

la nica
literatura
revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformata
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Delegitoj kaj lan-
daj Perantoj de UEA

Redakcio: Administracio:
7. Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

La traduko apartenas al la grandaj ŝarĝoj de nia
literaturo.

F. Szilagyi

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen
Prezo: bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonis: ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo
Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe.

U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.

Jen, hodiaŭ prezentas sin al vi LA REVUO ESPERANTO EN NOVA VESTO

Kun nova redaktoro, de nova
presisto, el nova oficejo.
Pli bela, pli alloga, pli dezirinda
ol iam antaŭe.

Certigu al vi la regulan ricevadon!
MA! Tuj pagu vian kotizon 1956
(10 gld.; 40 steloj);

Abonantoj! Renovigu vian abonon
(7.50 gl.; 30 steloj);

MJ! Se eble, kresku al MA en tiu
ĉi jaro.....

Pagu al Landaj Asocioj, Ĉefdele-
gitoj, Perantoj en propra valuto
aŭ rekte al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Een-
drachtsweg 7 en guldenoj aŭ
steloj.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Ek de januaro 1956 aperas ĉiumonate (krom en aŭgusto kaj septembro) la nova
Esperanto kaj Kulturo INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Prizorgas ĝin la franca Asocio de Esperan-
tistaj Geinstruistoj. La utiligo de la paĝoj en
esperanto de la ĝisnuna revuo de la asocio,
kiel kerno de la INTERNACIA PEDA-
GOGIA REVUO, certigas regulan aperon
kaj spertan kunlaborantaron, kiun la redakcio
deziras pli kaj pli internaciigi.

Ankaŭ ĉe ĉiuj ĉefdelegitoj kaj landaj perantoj de U.E.A.

Pedagogoj kaj Esperanto-Instruantoj trovos
en ĝi interesajn artikolojn.

Specimeno havebla kontraŭ respondkupono.

Jarabono 400 F.F., ĉe s-ro BIDOIT, en
BAUGE (M-et-L), Francujo, Poŝta konto:
Nantes N-ro 14 38 67.

Post dudek jaroj da atendo!

ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO

Efektive, jam dum pli ol dudek jaroj la esperantista
popolo atendis la aperon le nova tutesperanta lek-
sikono. Dum pli ol dek jaroj ĝi esperis ke tiu lek-
sikono estos ilustrita.

★

Nun tiu libro aperis. En la pasintjara sep-
tembro publikigis la unua volumo (A-K) de
la *Ilustrita Vortaro de Esperanto*.

En ĉi tiu volumo, kies tekston verkis spertuloj
el ses nacioj kaj presis sur altkvalita papero
moderna presejo, estas

XIV/642 paĝoj (23 x 17 cm). 612 ilustraĵoj (ankaŭ
tutpaĝaj!). Propraj nomoj de la mitologio kaj geogra-
fio. 22 000 difinitaj vortoj, inter kiuj pli da kemiaj
kaj zoologiaj terminoj ol en iu alia esperanta vortaro.
Abundaj ekzemploj. Etimologioj de ĉiuj radikoj.
Teksto moderna, kompleta, utila.

★

Eldonis
Francisco Azorin (en Meksiko)
Mendu de

via kutima libroservo esperantista, aŭ de
U.E.A.

prezo: elegante bindita, (\$7). Broŝ., (\$6.50)